



3*89=132*

STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Vážení čtenáři,

pro své esperantské přátele v zahraničí můžete naším prostřednictvím objednat svazový věstník STARTO. Předplatné na všech 6 čísel plus poštovné činí 60 Kčs ročně. Touto cestou můžete získat různé zahraniční esperantské časopisy, které nelze předplatit prostřednictvím PNS, ale které Vám mohou Vaši přátelé výměnou posílat. Neváhejte proto s objednávkou, ale pozor! Na zadní stranu složenky "díl pro příjemce" napište čitelně adresu, na kterou máme STARTO posílat.

Sekretariát ČES -
expedice

Objednávky esperantských knih a materiálů vyřizuje: ČES, expedice, Praha 1, Jilská 10, PSČ 110 01. Některé publikace jsou na skladě v omezeném množství. Neváhejte proto s objednávkou!

<u>J. Čink: Cvičebnice esperanta pro pokročilé</u>	24,- Kčs
<u>R. Hromáda: Esperantsko-český a česko-esperantský kapsní slovník</u>	28,- Kčs
<u>L. Prachař: Esperanto I. Učebnice vhodná pro děti ve věku 8-9 let, 19 lekcí. Jako příloha jsou pracovní listy na vypracování úkolů.</u>	14,- Kčs
<u>L. Prachař: Esperanto II. Druhý díl učebnice pro děti, navazuje na první. Pracovní listy jako u I. dílu.</u>	24,50 "
<u>J. a K. Filipevé: Velký slovník esperantsko-český 2 díly</u>	65,- Kčs
<u>Esperanta medicina terminaro. Abecední přehled odborných výrazů z lékařské oblasti</u>	19,- Kčs
<u>JUDr. K. Traxler: Česko-esperantský právní slovník</u>	43,- Kčs
<u>M. Malovec: Gramatiko de Esperanto. Moderní mluvnice esperanta, která Vás na 100 stránkách seznámí důkladně se všemi aspekty jazyka</u>	17,- Kčs
<u>J. Werner: Terminologia kurso. Základní učebnice pro všechny, kdo se shtějí blíže seznámit s problémy esperantské terminologie</u>	20,- Kčs
<u>Problémy interlinevistiky. Sborník materiálů z odborného semináře z května 1987. Přednesené referáty v češtině a slovenštině, resumé v esperantu.</u>	30,- Kčs
<u>S. Kamarýt: Historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio. Podrobný přehled vývoje esperantského hnutí v našich zemích. Přehled literatury, osobní rejstřík. Publikace, která by neměla chybět v knihovně žádného kroužku či základní organizace</u>	42,- Kčs
<u>J. Vondroušek: Historie a spisovatelé. Česky psaný stručný přehled esp. dějin a literatury pro první informaci zájemcům o jazyk a hnutí</u>	5,- Kčs
<u>Dokumentoj kaj materialoj. Projevy Michaila Gorbačova na 19. konferenci KSSS.</u>	10,- Kčs
<u>M. Gorbačov: Renovigan ideologio por la revolucia rekonstruo. Ĝaŝt na plénu ŭv KSSS 18.2.1988</u>	3,- Kčs
<u>M. Borbačov: Oktobro kaj la rekonstruo - la revolucio daŭras. Zpráva k 70. výročí VRSR.</u>	3,- Kčs

FERVOJISTOJ AKTIVAS

150 jarojn de la fervoja trafiko en Ĉeĥoslovakio

Ĉi-jare oni rememoras 150 jarojn de la fervoja trafiko sur teritorio de Ĉeĥoslovakio.

La 11-an de novembro 1838 sur finkonstruita linioparto de Norda Fervojo de la Imperiestro Ferdinando /KFNE/ el Rajhrad al Brno la unuan fojon ekveturis la vaporlokomotivo Moravia, estrata de la supera inĝeniero Karl Ghega, la konstruanto de la linio. Kiel informis la tiama gazetaro, la unua provveturo dum tiu memorinda dimanĉa posttagmezo efektiviĝis sume tri fojojn.

La unua lokomotivo Moravia estis alveturigita al Rajhrad la 22-an de oktobro 1838 el Vieno en kestegoj pere de pezaj veturigistaj ĉevalveturiloj.

Sed oficiale oni traktas kiel komenco de la fervoja trafiko sur teritorio de Ĉeĥoslovakio la 7-an de julio 1839, kiam la unuan fojon sur linio Břeclav - Brno solene veturis la pasagertrajno, tirata per vapora lokomotivo. La trajno kun lokomotivo Gigant elveturis matene el Vieno kaj la saman tagon posttagmeze oni solene bonvenigis ĝin en Brno. Per tiu ĉi memorinda veturo oni solene komencis centkvindekjaren historion de la fervoja trafiko sur teritorio de la nuna ĈSSR.

La fervoja reto kiel grava kondiĉo por evoluo de ekonomio kaj la tuta socio rapide disvolvigis kaj ankoreu dum la lasta jarcento oni konstruis ĉiujn ĉefajn fervojliniojn. Sur tiuj linioj trakiis dum tiu tempo centoj da diversaj tipoj de la fervoja veturilaro.

La plej rimarkinda evoluo de la fervoja trafiko okazis post la dua mondmilito kaj la Ĉeĥoslovakaj Ŝtataj Fervojoj /ĈSD/ apartenas nuntempe al la plej intensive eluzataj fervojretoj en la mondo. Ĝis 1958 plimulton de la fervoja transporto oni plenumis per la vapora trakcio, de post tiam transprenis la gvidan rolon trakcio elektra, kompletigata per motortrakcio.

ĈSD nuntempe prizorgas pli ol 13 000 km da linioj, el kiuj kvarono estas elektrizita. Sur tiu linioreto oni transportas poŝtare 420 milionojn da pasageroj kaj 300 milionojn da tunoj da varoj.

La solenaĵoj de la centkvindekjara datreveno de la fervoja trafiko okazos en la tagoj 24-an de junio ĝis 16-a de julio 1989.

La ĉefa punkto de la solenaĵoj estos ekspozicio pri la disvolvo de la fervojo en ĈSSR, okazonta 24.6.1989-16.7.1989 en pavilono "A" kaj sur liberaj placoj de la ekspozicia komplekso en Brno. La ekspozicio montras al vizitantoj la fervojon el tri vidpunktoj - la estinton, nuntempon kaj estonton - sed ankaŭ el vidpunkto de ĝia graveco por evoluo de la nacia ekonomio en ĈSSR.

En kadro de la ekspozicio oni organizos teknikajn tagojn de la unuopaj fakoj kaj entreprenoj fabrikantaj la fervojajn teknikojn kaj ankaŭ de la fervojaj entreprenoj:

Meza Fervojdirekcio, Olomouc	24.6.1989
Orienta Fervojdirekcio, Bratislava	25.6.1989
Esplora Fervoja Instituto /VÚŽ/, Praha	26.6.1989
Esplora Instituto Trafika, Žilina	27.6.1989
Atlernejo de Trafiko kaj Komunikigo, Žilina	28.6.1989
Robotron, GDR	29.6.1989
Automatigo de Fervoja Trafiko, Praha	30.6.1989
Nordokcidenta Fervojdirekcio, Praha	1.7.1989
Sudokcidenta Fervojdirekcio, Plzeň	2.7.1989
Energomŝexport, Sovetunio	3.7.1989
Plasser u Theurer, Aŭstrio	4.7.1989
Aŭstria Federaciaj Fervojoj	5.7.1989
Fervoja Ekonomia Riparado, Nymburk	6.7.1989
Škoda, Plzeň	7.7.1989
ČKD, Praha	8.7.1989
Ĉeĥoslovakaj Vagonejoj, Poprad	9.7.1989
Intrans, Praha	10.7.1989
Elektrizado de la Fervojoj, Praha	11.7.1989
Ŝtata Instituto de Trafika Projektado, Praha	12.7.1989
Mekanizado de Linia Mastrumado	13.7.1989
Fervoja Entrepreno de Konstrua Fabrikado, Uherský Ostroh	14.7.1989
Fervoja Konstruado, Bratislava	15.7.1989
Fervoja Militistaro, Praha	16.7.1989

Dum la sama tempo /24.6.1989-16.7.1989/ okazos en fervoja stacio Břeclav Ekspozicio de la Fervoja Veturilaro. Fervojajn veturilojn oni povos spekti ankaŭ en fervoja stacio Brno-Horní Heršpice en la tagoj 24-an kaj 25-an de junio kaj la 1-an, 2-an, 8-an, 9-an, 15-an kaj 16-an de julio 1989.

Parto de la solenaĵoj estos ankaŭ Internacia Simpozio de la Ĉeĥoslovaka Sciencteknika Kompanio pri Fervoja Trafiko, okazonta la 5-an ĝis 7-a de julio 1989 en hotelo Voroněž en Erno.

La ĉefa solena kunveno memore al 150-jara datreveno de la fervoja trafiko sur teritorio de Ĉeĥoslovakio okazos la 8-an de julio 1989 en Teatro de Janáček /"Janáčkovo divadlo"/ en Erno.

La ĉefan tagon de la solenaĵoj - 7.7.1989 ekveturos el Břeclav al Erno simbola trajno, tirata per vapora lokomotivo. En la sama tago la eksterordinara trajno kun elektra lokomotivo sur linio Brno - Břeclav veturos per rapideco 140 km/h. Sed veturoj de la historiaj trajnoj sur linioj Brno - Břeclav, Erno - Zastávka u Brna, Brno - Skalice, Brno - Blažovice, Brno - Holubice kaj Břeclav - Lednice okazos ankaŭ dum aliaj tagoj en periodo 24.6. - 16.7.1989.

La Centra Kulturdomo de la Fervojistoj en Praha kunlabore kun Ĉeĥoslovaka Radio anoncis la konkurson La Blua Kanto, al kiu oni povis kontribui ĝis la 30-a de septembro 1988. Alvenis ĉirkaŭ sesdek kontribuoj - novaj kantoj pri trajnoj kaj la homoj ĉirkaŭ ili. Finalo de tiu ĉi konkurso kaj elekto de la plej bonaj kantoj okazos la 8-an de julio 1989 en Teatro de Janáček en Erno.

Partoprenantoj de la solenaĵoj povos krom tio viziti Ekspozicion de la Fervojoj Modeloj, okazonta 24.6.1989 - 16.7.1989 en Teknika Muzeo en Brno.

Dum la sama tempo okazos en "Sdružený kulturní dům ROH" en Břeclav Ekspozicio de Fotografajoj, Bildoj kaj Pentraĵoj de la Fervojistoj.

Garantianto por sendo de diversaj memoraĵoj, objektoj, insignoj, publikaj, kolorafiŝoj, bildkartoĵoj, Fervoĵaj kalendaroj kaj aliaj estas NADAS /Eldonejo de Trafiko kaj Komunikigo/.

Ĉiu partoprenonto de la solenaĵoj do povas elekti el sufiĉe abunda programo de la solenaĵoj.

Kompilis Jindřich Tomášek

Landa Amika Renkontiĝo en Hungario

Komence de julio jam tradicie renkontiĝas niaj hungaraj fervojistaj kolegoj, dum sia Landa Amika Renkontiĝo, por pritrakti sian tutjaran agadon, starigi kaj akcepti agadplanon por venonta periodo.

La pasintjara, jam 24-a Landa Amika Renkontiĝo okazis en sudhungara urbo Kiskunhalas inter la 1-a kaj 3-a de julio 1988. Krom delegitoj kaj aligintaj membroj de la Fervojista Fako de Hungara Esperanto-Asocio /pli ol 1100 membroj/ laŭ invito alveturis ankaŭ reprezentantoj de fervojistaj esperantistoj el Aŭstrio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, FRG, GDR kaj Jugoslavio.

Sabate antaŭtagmeze okazis en la Fervoja Kulturdomo laborkonferenco de la delegitoj de la Fervoĵaj Fakgrupoj /kluboĵ/. Jam unu horon antaŭ ĝia komenciĝo koncertis antaŭ la Kulturdomo blorokestro de la uniformitaj fervojistoj el Kiskunhalas. Dum la konferenco la aliaj partoprenantoj kaj aligintaj eksterlandaj gastoj ekskursis autobuse tra la regiono Kiskunság por poste bani sin en termala banejo Kiskunmajsa.

Post komuna solena tagmanĝo kaj mallonga ripozo ni je la 15-a horo denove kolektiĝis en fervojstacio Kiskunhalas, kie okazis solenaĵo de nomdono de la nova elektra lokomotivo "Kiskunhalas" fabrikata en Budapeŝto por MÁV.

Post akcepto de la delegitoj ĉe la Urba Konsilantaro kaj urbovizito /veturo per autobuso/ ni denove kolektiĝis en la Fervoja Kulturdomo por partopreni solenaĵon kun kulturprogramo.

Dum la solenaĵo reprezentanto de la Sindikatoj d-ro Jenő Péskue tre pozitive pritaksis agadon de la hungaraj fervojistaj esperantistoj kaj la rezultojn, kiujn ili atingas sur kampo de kunlaboro kaj reciproka interkompreno helpe de la internacia lingvo. La vicprezidanto de Hungara Esperanto-Asocio d-ro Árpád Rátkai ankaŭ tre alte taksis agadon de la fervojistoj, kiuj estas la plej aktiva kaj rezultplena fako de HEA kaj solene transdonis al ok elektitaj fervojistoj honormedalojn por ilia multjara meritplena agado por internacia lingvo. Dum sekva kulturprogramo ni krom alia spektis muzikensemlon de la loka mezlernejo, prezentanta ariojn de W. A. Mozart kaj junularan muzikgrupon Holos, prezentanta en naciaj kostumoj tipajn folklorajn melodiojn kaj dancojn. Grandan sukceson atingis ankaŭ s-anino Wang Liu el Ĉinio, kiu kantis al la dankema publiko kelkajn tipajn ĉinajn kantojn, ravaj pro sia bela kaj rava melodioj.

Dum vespera balo kun programo kaj riĉa tombolo ni en la Fervoja Kulturdomo ĝisstate amuziĝis kaj dancis.

Dimanĉe matene post komuna matenmango ni vizitis Csipkeház /Puntodomo/, kie ni vidis unikajn kolekton de la punktoj, per kiuj Mária Markovitz kun siaj kunlaborantinoj kaj ĉaŭrigantinoj famigis sian urbon en la tuta mondo kaj krome ankaŭ tion, kiel preparigas tiu ĉi altvalora manlaboro.

Kantante la esperantajn kaj hungarajn kantojn ni gaje revenadis al Kiskunhalas, kie post komuna tagmango tiu ĉi bonŝukcesa Landa Amika Renkontigo oficiale finiĝis. Dankon al vi, niĝj hungaraj kolegoj, por tiu ĉi bela kaj tre zorge preparita aranĝo!

Fervojista jarkunveno en GDR

Bad Suderode, kuraĉloko sur norda deklivo de Harc-montaro, fariĝis loko de la lasta jarkonferenco de niaj nordokcidentaj kolegoj el GDR. Jarkonferencon en tiea ripozloko de fervoja riparejo Halberstadt partoprenis ĉirkaŭ sesdek partoprenantoj, inter ili delegitoj kaj gastoj el FRG /IFEF-prezidanto Joachim Giessner/, Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Hungario kaj Pollando. El ĈSSR partoprenis kvar membroj de FS ĈEA.

Ĉiuj partoprenantoj estis kore bonvenigataj kaj akceptataj jam dum alveturo al stacio Bad Suderode. Stacidome eĉ survoje al "Ferienheim REISSAUSS", kie okazis la konferenco, estis instalitaj informtabuloj, tre utilaj precipe por eksterlandaj vizitantoj, samtempe bona propagandilo pri Esperanto tiuloke.

La sekva sabato kiel ĉeftago de la renkonto estis plena de aranĝoj. Dum duontaga veturo la partoprenantoj ekkonis parton de ankoraŭ kvinlinia mallarĝspura /1000 mm/ fervojsreto en Harc-montaro.

Posttagmeze okazis laborkunsido. Dum unua parto, kiun partoprenis nur fakgrupanoj el GDR, la eksterlandaj gastoj sub ĉiĉeronado de Horst Theurich vizitis Bad Suderode kaj proksiman ĉirkaŭaĵon.

Menciante laborkunsidon, ni devas gratuli al niaj kolegoj el GDR pro alia farita laboro. Ekzemple n-ro 29 /3/1988/ de ilia bulteno "Fervojistaj Novajoj" enhavas lastan parton de Esperantogermana fakvortaro, danke al kolegoj Horst Theurich kaj Horst Jasmann pro ilia senlaca laboro. Specialan dankon meritas ankaŭ bone prilaborita temo de la lasta jarkunveno, nome "Stacidomoj". Post enkonduka prelegeto fare de Heinz Hoffmann prezentis dispozitivajn Joachim Giessner pri norvegaj kaj danaj stacidomoj, Gerhard Zeidler pri stacidomoj en distrikto Karl-Marx-Stadt, Janos Patay pri detaloj de Orienta stacidomo en Budapeŝto kaj Ferenc Phersy pri kelkaj aliaj stacidomoj en Hungario. Oni devas menciigi ankaŭ interesan prelegeton de Heinz Hoffmann "Esperantlingvaj anoncoj en fervojaj stacioj", pledanta por enkonduko de Esperanto en informanconojn en pli gravaj fervojstacioj kun internacia transporto de pasageroj.

Distra vespero finis la streĉan tagon.

Dimanĉe antaŭtagmeze la partoprenantoj veturis per trajno al Quedlinburg.

Unu el la plej sude situanta komunumo en Suda Moravio - Valtice fariĝis la gastiganto de la 22-a jarkonferenco FS ĈEA.

Dum la jarkunveno la 30-an de septembro 1988 vespere unue la prezidanto de FS ĈEA František Strumínský raportis pri la tutjara agado de la sekcio. Oni okazigis sukcesan Printempan Renkontigon en Česká Třebová. Kvinmembra delegacio partoprenis la lastan IFEF-kongreson en la sudfranca Perpignan. Delegitoj de la sekcio kaj iuj membroj partoprenis jarkonferencojn aŭ tutlandajn renkontigojn de la kunlaborantaj fervojistaj sekcioj en Aŭstrio, FRG, GDR, Hungario, Jugoslavio kaj Pollando. La membrobazo nur iomete kreskis. Oni deziras okazigi 43-an IFEF-kongreson en 1991 la unuan fojon en Ĉeĥoslovakio.

Eksterlandaj delegitoj laŭvice salutis poste la jarkonferencon, mallonge informante pri la agado de sialandaj IFEF-sekcioj kaj transdonante donacetojn. En la nomo de IFEF kaj samtempe de GEFA parolis ties prezidanto Joachim Giessner. Li subtenis la ideon okazigi 43-an IFEF-kongreson en Ĉeĥoslovakio. Krom alia li akcentis, ke nia komuna lingvo Esperanto neniom utilus, se nia mondo estus detruita, ni esperantistoj do havas taskon kontribui por la vivo de nia kaj la estontaj generacioj strebi por daŭra konservo de la mondopaco, sed krome ankaŭ kontraŭ nocaĵ malutiloj, kaŭzataj per troa kemizado de la vivmedio.

Reprezentanto de la slovakaj fervojistaj esperantistoj Magda Feifířová el Žilina informis, ke oni antaŭvidas baldaŭ fondi la fervojistan sektion en Slovakio, por kio oni jam agas kolektante fervojistajn membrojn. Ni esperu, ke niaj slovakaj kolegoj sukcesos renovigi sian agadon.

En la nomo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio salutis ties prezidanto ing. Petr Chrdle. ĈEA subtenas planon de FS okazigi 43-an IFEF-kongreson en ĈSSR. Krom alia oni planas en la jaro 1992 - okaze de 400-jariĝo de Komenio - en Františkovy Lázně reinaŭguri monumenton de la kreinto de Esperanto L. L. Zamenhof, kiu estis tie inaŭgurita jam en la jaro 1914 kiel la unua Zamenhofa monumento en la mondo, sed en 1938 ĝi estis detruita kaj forigita fare de la nazioj.

Kolego Jiří Piřtora informis pri distribuado de nia revuo Internacia Fervojisto. Li petas ĉiujn reabonontojn /sed ankaŭ tiujn novajn/ nepre sendi al li la 5-an parton de la poŝtpagilo por havi garantian, ke ili regule plu ricevados la revuon. Kolego Jaroslav David, prezidanto de TK informis pri la terminara laboro. Oni finis kompiladon de la terminaro laŭ III-a kaj IV-a eldonoj de UIC-vortaro. Li petas helpojn de la kompetentaj kolegoj por finordigi kaj transskribi la slipojn kun fakterminoj, por ke la vortaro estu preparita por eldono dum 1989. Kolego Jindřich Tomířek informis pri agado de la informa fako de la sekcio, kiu kvankam ne havante sian propran bultenon, sukcesis aperigi en IF, Starto kaj aliaj, precipe neesperantlingvaj porfervojistaj gazetoj dum laŝta fervojista jaro sume 52 artikolojn, informojn kaj fakajn tradukaĵojn kun mencio, ke temas pri tradukoj el aŭ pere de Esperanto, popularigante tiamaniere nian lingvon inter neesperantistoj.

Sabate, la 1-an de oktobro pli ol sesdek partoprenantoj kaj gastoj dividis sin en du grupojn. La unua post vizito de Dolní Věstonice piedmarŝis tra Pavlovské vrchy /Palava montetaro/, konsistanta el ĉeno de la kalkŝtonaj montetoj, al historia urbo Mikulov. La dua grupo ekskursis al Lednice, kie oni konatiĝis kun fama kastelo kaj la vasta kastela parko, kie troviĝas krom en 1717 konstruita 180 metrojn longa orangerio la minareto el 1798 kaj aliaj vidindaĵoj.

Vespere ĉiuj denove kolektiĝis dum komuna vespermanĝo, post kiu oni vizitis la vinkelon, kie oni amuziĝis kantante, babilante kaj gustumante bonan sudmoravian vinon ĝis noktaj horoj.

Dimanĉa antaŭtagmezo estis dediĉita al komuna trarigardo de la kastelo Valtice kaj iuj historiaj partoj de la urbo.

Jindřich Tomíšek

Fervojista kongreso en Pollando

En la tagoj de la 11-a ĝis la 13-a de novembro 1988 okazis en Swidnice (Pollando) 5-a kongreso de fervojistoj. El nia lando partoprenis ĝin ges-anoj Alois Klumpar, ing. Zdeněk Polák kaj Květa Hubnová. Inter preskaŭ sepdeko da partoprenantoj estis s-anoj el Belgio, FRG, GDR, ĈSSR kaj Hungario. La kultura parto de la programo okazis en la domo de Klubo de fervojistoj en Swidnice.

La venonta kongreso de la polaj fervojistoj-esperantistoj en la jaro 1989 okazos en Sepólno de la 22-a ĝis la 24-a de septembro. La urbo estas konata kiel loko de multaj internaciaj sportkonkursoj kaj ĝi situas en la nordokcidenta parto de Pollando 114 km de Gdansk. Pri Sepólno estis eldonita E-lingva flugfolio fare de vojaĝoficejo Esperantotur, Pl. Wolności 114, PL 89 400 Sepólno Krajowe.

Nova prezidanto de la Fervojista Sekcio

En la komitatkunveno de la fervojista sekcio la 29-an de novembro 1988 en Česká Třebová estis unuanime elektita nova prezidanto de la sekcio s-ano Jindřich Tomíšek, ĉar la ĝianuna prezidanto s-ano Strumínský pensiuliĝis. La sekcianoj aprezas lian laboron kaj al la nova prezidanto deziras multe da sukcesoj en la nova funkcio. La redakcio de Starto same gratulas al s-ano Tomíšek, la diligenta kunlaboranto de nia gazeto.

Esperanto en la Radiostacio Ostrava

Radiostacio Ostrava elsendis la 4-an de januaro 1989 interesan rakontadon de Drahomír Kočvara pri liaj pacaj misioj en Moskvo kaj Volgogrado. Ĉar ĉi-jare en julio pasos jam 60 jaroj, kiam la stacio ekfunkciis, ĝi elsendadas rememorojn pri la antaŭaj pasintaj tempoj. Tial estis invitita ankaŭ Adolf Stanura, kiu en 1945 - 1949 paroladis en la Esperantaj elsendoj de la stacio kune kun Vladimír Slaný kaj Zdeněk Raška. La 24-an de jan. estis disaŭdigata lia rakontado pri tiuj programoj kaj esprimita espero, ke la Esperantaj elsendoj renoviĝos. AST.

La sukcesaj invalidoj

La estraro de la sekcio de invalidoj de ĈEA informas pri la sukcesa agado de la sekcio en la jaro 1988. Ili akiris je 100 % pli da membroj, ol estis planite, por la membreco en ĈEA ili varbis 46 novajn membrojn en 1988, ili aranĝis kolekton de malnovaj okulvitroj por Afriko en la kadro de AGADO E 3 kaj forsendis 5.190 okulvitrojn kaj fine de la jaro ili aranĝis monkollekton por Armenio, trafita de tertremo, kaj dum dek tagoj ili kolektis kaj al la Fonduso de paco kaj solidaro forsendis 14.150 kronojn.

FOTOKRONIKO



1

2



3

4



5



- Fotoj pri la fervojista kongreso en Kiskunhalas en Hungario
1. Parto de la kongresanoj antaŭ fervojista manĝejo en Kiskunhalas
 2. Blcovorkestro de la hungaraj fervojistoj el Kiskunhalas koncertas antaŭ la Fervoja Kulturdomo
 3. La akcepto de la delegitoj de la Urba Konsilantaro en Kiskunhalas, la dua de maldekstre IFEF-prezidanto Joachim Giessner
 4. La cehoslovakaj delegitoj kun la hungara kolego János Patay antaŭ ventmuelilo.
 5. Foto el la renkontigo de invalidoj en Hodonín (vidu pĝ. 21)

Nekrologoj

Adolf Bartošík

(1907-1989)

La 3-an de februaro mortis en Praha, post grava malsano, s-ano Adolf Bartošík, faka instruisto-logopedio. Li naskigis la 1-an de majo 1907 en Boršice ap. Buchlovice. Esperantisto de 1926, de 1927 disvastigis Esperanton per multaj kursoj, fondis Slovakian Esperanto-Klubon en Uherské Hradiště kaj plurajn rondetojn.

En 1934-37 li instruis Ĉe-metode en Jugoslavio kaj Nederlando, pri kio aperis 136 ĵurnalraportoj en ok lingvoj. En Nederlando li edzigis (1937) al sia kursanino kaj instruistino Ina Woudstra el Frisujo (per urbodoma ceremonio en la Internacia Lingvo). En 1938-39 li instruis en ĉeĥa lernejo en Eindhoven, de kie la geedzoj fugis per la lasta sipo en Brition, ĉar Hitler estis okupanta la landon. Tie li servis en nia eksterlanda armeo (cefleutenant), poste li direktoris la ĉeĥan statan lernejon "Mama Benešová" en Malpas. De 1945 li deĵoris en la ministerio por informado (tie ankaŭ en la Esperanta subsekcio) kaj poste en la ministerio de edukado, 1950-69 li estis faka instruisto, fako logopedio. - En Prago li dum pluraj jaroj gvidis la kunvenojn de Esperantista Klubo, kies vicprezidanto li estis, redaktis Zpravodaj de la laŭtema sekcio "Esperanto" de Asocio de ĉeĥaj filatelistoj.

A. Bartošík estis rekonata Esperanta grafikisto (i.a. la I-a premio, 1956, en Danlando), en Britio li aŭtoris stampojn de la ĉs. kampa poŝto. Li kreis bele ekipitan unikan kolekton "Filatelo kaj Esperanto", kiu gajnis pli ol 30 distingojn kaj medalojn (ec argentaĵn kaj orumitan) en naciaj, internaciaj kaj en tutmonda ekspozicio de postmarkoj.

Adolf ("Dolfa") Bartošík, homo modesta, laborema, honesta kaj amikema, vivis fruktoričan vivon kaj atingis honoran membrecon de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La adiaŭan ceremonion en la kremaciejo Motol ĉeestis delegacio de la ĈEA-estraro kaj pluraj esperantistoj. La adiaŭan parolon, ankaŭ en la nomo de ĈEA, prezentis J. Kařík.

Vladimír Slaný

(1907-1989)

S-ano Vladimír Slaný, membro kaj honora komitatano de Esperanto-klubo Ostrava-Vítkovice, mortis la 6-an de februaro 1989 82 jarojn aĝa. Li konatiĝis kun Esperanto kiel 14-jara knabo. De sia 20-a jaro li disvolvis largan poresperantan agadon. Prelegis, tradukis, publikigis, gvidis kursojn. En la j. 1930 li komencis prelegi en radiostacio Ostra-

va kaj denove post la okupacio 1945. Li funkciis kiel ano de asocia komitato, regiona peranto por regiono Ostrava, faka tradukisto por lingvo Esperanto de iama Leŝia juĝa tribunalo (1947). Kunorganizado de someraj lernejoj en Rožnov kaj Příbor (1949-1953). Multobla funkciulo, delegito de UEA, sennombraj estis kursoj de li gviditaj. Senlaca, oferema, sincera, neprofitema, ciam en la unua vico dum pli ol 60 jaroj. Esperantista komunumo ege bedaŭras lian foreston kaj neniam lin forgesos. (Ing.J.)

loka vivo

BEROUN La 7-an de januaro 1989 okazis en la restoracio "U Ciprů" (Králov Dvůr) la unua renkontiĝo de esperantistoj de la distrikto Beroun. La kunvenon partoprenis du membroj de la E-rondeto en Kladno, s-anoj Slavík kaj Krob, kiuj la ceestantojn informis pri la organizo de la Esperanto-movado en nia lando kaj en la mondo kaj konatigis ilin pri la kondiĉoj, sub kiuj eblas fondi E-rondeton aŭ bazan organizaĵon de ĈEA. Malgraŭ ke ceestis nur kvin homoj el dek unu invititaj, estis la renkontiĝo fruktodona. Aparta danko estu esprimita al s-ano Špačková el Králov Dvůr, kiu volonte organizis tiun gravan arangon. -jk-

MAVÍROV La postferia agado de la rondeto komencis per malfermo de E-kursoj por komencantoj (prof. Mil. Pastrnák) ec por progresintoj (Zd. Heiser). En oktobro estis arangita la unua novsezona preleĝo kun diapositivaj. Pri sia vojaĝo en Andaluzio (suda Hispanio) interese rakontis Jarmila Pastrnáková. La duan paroladon faris en novembro s-ano Molan pri GDR. La 15-an de dec. ni rememoris kun E-hinno la datrevenon de naskiĝo de d-ro Zamenhof, kies voĉon poste audigis al ni per magnetofono nevidanta s-ano Zemčík. S. Chmiel rakontis pri libertempo, pasigita en Korea Popoldemokratia Respubliko. Tio estas por ni lando vere ekzotika, kies vivo estas tute alia ol la nia, kion pruvis unikaj diapositivaj kaj rakontado de la vojaĝinto. Intereso estis granda, kiel atestis multaj demandoj, sekvantaj post la projekciado kaj la respondoj ec mirigis la aŭskultantojn. AST.

OPAVA La rondeto de ZK ROH Ostroj Opava kunvenas Ĝimnards kaj vikle aktivas. En septembro ĝi organizis jam la VI-an Esperantistan Kultur-Festivalon kaj kun-

organizis ekspozicion de ABC-libroj en la Muzeo de P. Bezruč kunlabore kun la Silezia Muzeo en Opava. Oni akiris materialon de eksterlandaj esperantistoj el 15 landoj. La ekspozicio daŭris ĝis la 20-a de februaro kaj informis pri ĝi la gazetaro (ankaŭ Rudé právo la 7-an de januaro). Pri la agado de la rondeto vaste informis precipe la loka gazetaro kaj ankaŭ Radio Ostrava (22.8.1989).

PARDUBICE ZK TESLA En modestaj kondiĉoj, sed kun nekompromisa reguleco kunvenadas rondeto de Esperantistoj de ZK ROH Tesla Pardubice. Dank' al komitato de Civita komitato 62, kiu disponigis kunvenejon, kaj al granda sinoferemo de geestroj de la rondeto (komencantojn gvidas s-ano L. Rýznar kaj progresintojn s-ano J. Rýznarová) la anoj de la rondeto havas eblecon akiradi kaj profundigi siajn lingvokonojn de Esperanto.

Ĉiu kunveneto estas interesa. Ekzemple, projekciado de diapositivaj el fremdaj landoj, el libertempoj kaj diversaj ekskursoj estas komentata Esperante. Aŭ "Vespero de kristnaskaj bondeziroj", kien ni alportis bondezirojn de niaj korespondantoj kaj ni poste prijuĝis, kiu ricevis la plej belan. Ofte unu el klubanoj "faras instruanton" kaj li gvidas "lernohoron" memstare. Kiu gvidas, tiu devas scipopvi. Pro tio demandoj por konversacioj "el vendejo", "el strato" kaj aliaj, estas zorgeme preparitaj. Oni forgesas ofte je la tempo, tial unu horo daŭras ed naŭdek minutojn. La gestroj severe inspektas la "instruanton" kaj ili korektas lin. Tiaj kunvenetoj estas gojplenaj.

Ni informas ankaŭ urbanojn en du informsranketoj, pri Esperanta movado, pri novaĵoj en Esperanta vivo. Pluaj agadoj, ekzemple "Esperanta tago" aŭ ra-

kontado de J. Ryznarová pri UK de UEA en Rotterdam, kun projekciado de diapozitivaj, estis ankaŭ por familianoj kaj pluaĵ geamiko.

Por lernojaro 1988-89 ni varbis sep novajn interesulojn por kurso de Esperanto. Samtempe J. Ryznarová laboras kun du grupoj de gelnantoj de elementaj lernejoj. Kvankam ĉiuj ne persistos, estas tio tre merita laboro.

Ĉi tiujn faktojn konstatis ankaŭ datrevena kunveno de E-rondo, realigita la 1-an de februaro 1989. (F. Nechvíle)

PRAGA La Esperantista Klubo en Prago havas la avantaĝon, ke ofte vizitas ĝin eksterlandaj gastoj. Eks. la 16-an de januaro la klubon vizitis s-ano Mikuláš Nevan, iama gvidanto de la praga E-junularo kaj baptopatro de nia "Starto". Dum kelkaj jaroj li estis KKS kaj organizis UK-ojn, nun li estas "ĉehdevena nederlandano loganta en Usono". Li tre interese rakontis pri sia esperantista kaj profesia kariero kaj respondis multajn demandojn de la klubanoj. Li promesis baldau denove veni.

En la februara jarkunveno estis elektita nova komitato de la klubo. Nova prezidanto de la Praga Klubo fariĝis Ing. Khail.

PĚROV Esperantistoj printempe 1988 plantis ĉe ripozloko "Laguno" cent arbojn - piceetojn. Tion ili faris je honoro de la jubileo de Esperanto. Klubestro prelegis kvinfoje por civitanoj pri la 72-a UK en Varsovio kun koloraj diapozitivaj. Li ankaŭ partoprenis la 11-an MEM-konferencon en Budapeŝto kaj poste la ĉiujaran pacan marsadon Pardubice - Ležáký. La klubanoj kunvenadas ĉiam merkrede de la 13a ĝis 21a horo en uzina klubo de PĚrovské strojírny. Ĉiuj kiu venos, estas invitataj. Ĝis revido en PĚrov, kie vivis kaj instruis mondfama pedagogo Jan Ámos Komenský. (L.Chytil)

TRINEC Esperanto-rondeto de Domo de Kulturo ROH TŽ VĚSR arangas por siaj membroj kaj ankaŭ por la vasta publiko Amikajn Klub-renkontigojn ĉiam la unuan sabaton de monato ekde la 16-a horo en ĉlava klubejo de la DK. Por la renkontigoj oni eldonas belaspektajn faldfoliojn.

La 16-an de januaro oni arangis "Diafonon" - audiovidean promemon tra la ekskursaj, prelega kaj propaganda aktivecoj en la 50-jara historio de la rondeto. En la Informilo de la Kulturdomo oni aperigis dupagan artikolon pri la 100-jariĝo de Esperanto.

ŪSTÍ N. L. La E-rondeto ĉe la Domo de Kulturo ROH vigle laboras. La aktivecoj de la rondeto estis publike aprezitaj en konferenco de DK ROH la 27-an de aprilo 1988 kaj la komitatano de la rondeto doc. V. Novobilský ricevis diplomon por "oferema kaj iniciatema laboro en la Esperanto-rondeto de DK ROH".

La 4-an de novembro 1988 mortis la longjara membro de la rondeto, honora membro de ĈEA kaj membro de EVA s-ano Jiří Kořínek en ago de 82 jaroj.

Apud regulaj klubkunvenoj membroj de la rondeto partoprenis en multaj aliaj arangoj, ekz. la operkantisto Mirosl. Smyčka en UK, en koncertoj en Ūstí n.l. kaj Liberec, en la societa vespero en Prago ktp., Ing. J. Kříž prelegis en la Ĉs. numismatika societo pri Esperantaj moneroj, en junio 1988 efektivigis Mallonga Filmo Praha esperantigon de propagandaj filmoj pri Ĉeĥoslovakio por ĈEDOK, la esperantigon partoprenis Věra kaj Vl. Novobilský (kune kun E. Seemannová kaj J. Ondráček el Praha).

Pri la rondeto aperis ĵurnalartikoloj en Prŭboj, tradukoj de J. Kořínek aperis en la literatura revuo Fonto.

VÍTKOVICE Dum lasta septembra sabato faris geklubanoj el Vítkovice turisman ekskurson el Lysá Hora, la plej alta montopinto de montaro Beskydy. La ekskurso ĉeestis ankaŭ kvin gesamideancoj de ĝemeliga E-klubo el Žilina. La elirejon en Frýdlant nad Ostravicí ni atingis trajne kaj poste sekvis pieda grimrado ĝis la pinto, dum kiu ni admiris ne nur belecon de cirkaua naturo, sed ankaŭ malutilojn kaŭzitaĵn de proksimaj industriaj centroj. Favorajn impresojn kaj belajn travivaĵojn kontribuis ankaŭ suna vetero. - suR -

EK Vítkovice ne forgesas ankaŭ la plej junajn adeptojn de la lingvo internacia kaj tradicie arangas kaj printempe kaj autune ekskursojn kaj arangojn por

gepatroj kun infanoj. La 2-an de oktobro 1988 okazis en proksima apudostava arbareto bakado de terpoj en fajro. Ĉar la partoprenantoj kunportis ne nur terpoj, sed ankaŭ gitaron, regis ĉirkaŭ la tendarfajro vere entuziasma verda estos. La plej kontentaj estis infanoj.

Dimance matene kunvenis en stacidomo ok geklubanoj kaj kvar infanoj por forveturi en montaron Beskydy. Celo de la ekskurso estis bone konata montarkabano Solarka proksime de Frýdlant nad Ostravicí. Kvankam la 16-an de oktobro, kiam la ekskurso okazis, jam plene regis aŭtumo, la vetero belis kaj molaj sunradioj karesis ne nur vangojn de geekskursanoj, sed ankaŭ flavkoloran pitoreskan aŭtunan naturon. Ankaŭ servoj de restoracio en kabano Solárka estis altnivelaj, do la ekskurso plensukcesis. (- suR -)

ZNOJMO EK en Znojmo arangis la 14.12.88 en salonego de Kulturdomo "Vespero" omage al Ludoviko Zamenhof. La kultura programo konsistis el kantoj, deklamado, muziko, prelego pri signifo de Zamenhof, japana kontraŭmilita filmo kaj ekspozicio de libroj, gazetoj kaj bildkartoj. Partoprenis multe da esperantistoj kaj gastoj.

Vr.

OLOMOUC La kunvenoj de la E-rondeto okazas ĉiulunde en la agitecentro en la Placo de Paco n-ro 11 en Olomouc. Ing. Frant. Svoboda, kiu estis estro de la preparkomitato de la 5-a kongreso de ĈEA, aperigis siajn rememorojn pri la kongreso en formo de broŝuro.

La 22-an de oktobro 1988 mortis Ĥora membro de la rondeto JUDr. kaj PhDr. Zdeněk Šprinc, CSc., filo de prof. Ant. Šprinc, kiu estis unu el la unuaj E-piŝiroj en Olomouc kaj en aliaj moraviaj urboj. La mortinto meritigis precipe pro eldonado de informpublikaĵoj pri Olomouc. Honoron al lia memoro!

La 17-an de decembro 1988 geedzigis la gemembroj de la rondeto Dita Smékalová kaj Jan Smejkal. Gratulon!

El Nitra Informilo n-ro 1:

La 14-an de septembro 1988 estis fondita ce la Urba kleriga centro en Nové Mesto nad Váhom E-klubo. Kiel prezidantino fariĝis Mária Tomašovičová.

S-anino Alica Fabianová fondis en la urbo Komárno E-klubon kaj si fariĝis

prezidantino de tiu ĉi klubo.

La membroj de ĤEA el la Okcident-slovakia regiono dum aprilo aligis al la favorantoj de turistiko, al la konata Marso de danko en Nitra, kiu okazas ĉiujare honore al la sovetia armeo, pro liberigo de urbo Nitra.

Dum majo okazis turisma renkontigo de esperantistoj el la Okcident-slovakia regiono ce Smolenice-kastelo. La entrepreno estis tre sukcesa. Arangis ĝin s. Augustín Ĉambál kaj E-klubo Trnava.

En julio okazis renkontigo de esperantistoj de OkReg. en Nové Zámky, kiun arangis s-ano Geleta.

Esperanta klubo kunlabore kun la Urba kleriga centro en Senica arangis en oktobro Esperantan ekspozicion.

OkReg. komitato de ĤEA kunlabore kun E-klubo kaj kun la Urba kleriga centro en Senica arangis en decembro en la vilago Vrbovec renkontigon de esperantistoj el Moravio kaj Slovakio kun rica kultura kaj turisma programo. MaTa

DEKUNUJ TURISMAJ TAGOJ EN ŽILINA OKAZOS ekde 29.7.1989 ĝis 4.8.1989. Detalojn kaj aligilojn petu ce ESPERANTO-KLUBO post. B 152, 010 42 ŽILINA, Ĉeĥoslovakio,

SUKCESAJ FININTOJ DE KORESPONDA KURSO

de instruisto Ing. Vl. Kočvara:
Libuše Voráčková, Pod Hůrkou 513, 339 01
Klatovy III

Marie Strakušová, Zdražany 49, 503 63
Nepolisy

Ludmila Šebková; 378 42 Nová Včelnice 64
Lenka Cacáková, Tichonice 6, 285 09 Kácov
Jana Svobodová, Leninova 67, 665 01 Rostice u Brna

Zdeněk Skovajsa, Pozlovice 43, 763 26
Luhačovice

de instruistino Eva Hoffmannová:
Libuše Uhrlová, K Višňovce 2525, Pardubice
Ing. Zdenka Netopilová, Žerotínova 250,
Napaĵedla

Jana Krausová, Bezvřovov č. 123
Pavel Hnátek, Výletní 357, Praha 4-Libuše
Ing. Marie Švarcová, Elektrárnská 64,

Frýdlant nad Ostravicí
Miloslava Šírková, Husova 935, Chrudim IV
Petra Hloušková, Dvořákova 1145, Mladá
Boleslav
Věra Kieryková, Dukelských hrdinů 9,
Praha 7

Scienc-teĥnika sekcio

ĈU LA TERMINOLOGIA ESPERANTO-CENTRO AKTIVAS?

Dum la lastaj monatoj aperis opinioj, ke TEC nesufiĉe aktivas, ke ĝi produktas nur "paperojn" kaj ne terminarojn ktp. ktp. Tiaj opinioj aperas ankaŭ nialande, tial mi almenaŭ koncize respondu al ili.

TEC estis oficiale fondita dum la 72-a UK en Varsovio, nome 1987-07-27. Ĝi ne kalkulos la preparan konferencon en Prago 1987-07-04, ni devas konstati, ke TEC ekzistas ne pli ol unu jaron kaj duonon (la artikolo skribita en decembro 1988). Ĉu oni vere kaj serioze povis atendi amason da terminaroj ellaboritaj en la kadro de TEC dum tiom mallonga tempo? Se oni ne forgesas, ke TEC estas normiga terminologia institucio ellaboranta kaj aprobanta ĉiun nomenklaturan normon sub rigora kondiĉoj en antaŭe precize difinita kelkstupa procedo, kaj se oni havas almenaŭ minimumon da kono pri la terminologia laboro, tiam oni certe ne povas atendi post kelkaj monatoj librojn plenstopitajn per normaj terminaroj. Ajna serioza terminologia laboro estas ege temporaba kaj energipostula, des pli la agado kiu celas la normajn terminarojn. Eĉ bonaj terminaroj, kiujn ĝis nun ellaboris unuopuloj, devas subigi al internacia pridiskuto, por eviti ekz. naciismojn aŭ aliajn erarojn. Cetere, sincere dirite, estas raraĵoj tiaj terminaroj aŭ nomenklaturaĵoj proponoj de unuopuloj, kiuj estas sensange transpreneblaj kaj deklarindaj kiel normoj. Do, ni paciencu ion. Se ni postulas de TEC seriozajn rezultojn, ni ne rajtas postuli de ĝi santepe laboron hasteman kaj supraĵan.

Kaj ĉu multaj paperaĉoj estis produktitaj de TEC? Ankaŭ al tiu ĉi demando mi devas respondi negative. En la unuaj monatoj de sia estado dediciis TEC, resp. ties estraro, multe da tempo al la ellaboro de la regularoj por TEC kaj por ĝiaj unuopaj substrukturoj. En ili estas solvataj ne nur la organizaĵaj problemoj en la Centro mem, sed ankaŭ la kunlaboro kaj ligoj al aliaj parencaj organizaĵoj en la Esp-movado. Ĉu perdis tempo? Certe ne! Tiel mi devas respondi precipe sub la influo de miaj malbonaj spertoj, kiujn mi havas el la jaroj de mia aktivado en la Ĥemia Fakterminologia Komisiono de tiutempa Terminologia Centro (TC) de ISAE. Antaŭ du jardekoj karmemora Ing. Haferkorn el FRG, tiutempa direktoro de TC, estis fondanta fakterminologiajn komisionojn por unuopaj fakoj. Li intencis krei el ili normigajn labor-grupojn pli-malpli en la sama senco kiel nun volas TEC. Bedaurinde, Ing. Haferkorn tro baldaŭ retirigis pro sanaj kialoj el la direktora posteno, antaŭ ol li povis firme difini kaj statute subteni la agadon de la fakterminologiaj komisionoj. Eble li eĉ ion subtaksis danĝerojn. Liaj posteuloj en la direktora "seĝo", Ing. Broise kaj s-ro Eichholz, neniam konsideris unuopajn FTK, eĉ TC mem, kiel terminologiajn normigajn instituciojn. La komisionoj falis al la nivelo de simplaj kolektantoj de materialo por la Slipara Vortaro, eventuale por aliaj estontaj vortaroj. Cetere nemultaj komisionoj laboris vere komisionece, t.e. kolektive kaj sur internacia bazo. El la kolektita materialo unuopulo, ofte nekompetenta por koncerna fako, elektadis tion, kio plaĉis al li forĵetante la ceteraĵon. Oni fakte ne priatentadis no-

menklaturajn sistemojn, sed eltiradis unuopajn terminojn, fakajn nomojn. Tial mi kuraĝas diri, ke siatempa terminologia agado de TC fiaskis. Nome, ajna moderna terminologia laboro devas en si enteni samtempe la fenomenon de sistemigo kaj normigo. Sen tiu postulo la moderna terminologio perdus sencon. Se nun la estraro de la antaŭ nelonge fondita TEC volas en la unua stadio precipe tute klars kaj precize, per statutoj, regularoj kaj interkonsentoj, difini la devon, taskojn kaj rajtojn de TEC kaj ties substrukturoj, difini ĉiujn rilatojn kaj ligojn al la eksterajn organizaĵoj kaj institucioj, certe ili ne trovos pli fervoran defendanton de tiu sia agado ol mi estas. Ne nur mi, sed certe plejmulto da fakuloj ne emas en sia fako vicon da jaroj konstruadi kolektive la konstruaĵon, el kiu poste nekompetentulo eliros du - tri brikojn por forĵeti la ceteraĵon en rubejon. Mi ec opinias, ke tiu antaŭa "instituciigo" de TEC kaj ties komisionoj estas neevitebla kaj nepra antaŭkondico. Nur kiam oni plenumos ĝin, oni rajtos postuli de la fakuloj tiun multjaran formikecan laboron super unuopaj normaj terminaroj kaj nomenklaturaj sistemoj. Ni komprenu: kvankam la plejmulto el ni ne ricevas salaĵon por la Esperanta terminologia laboro, tamen en la 2-a jarcento de nia lingvo ni jam ne rajtos labori diletantece, sed sur suface faka - "profesia" - nivelo.

Ec la ĝisnuna periodo de TEC ne estis tiom neproduktiva (kio temas pri terminaroj) kiel saĝnas al iuj. TEC ne skribadis nur statutojn kaj regularojn. Estis kaj estas pridiskutataj kelkaj fundamentaj normoj por reguligi generale la laboran procedon en la tuta TEC. El la menciitaj normoj ekz. tiu pri "Fizikaj grandoj kaj unitoj" estas sendube norma terminaro. Cetere jam komencigis laboroj super pli specialaj normaj terminaroj, au estas diskutataj bonaj terminaroj jam preparitaj fare de unuopuloj.

Tial al la demando el la komenco de la artikolo "Ĉu TEC aktivas?" mi povas respondi jese. Kompreneble, ajna kreema kaj konstruema kritiko estas invitata kaj bonvenigata, sed pli bone estos se ĝin sekvos helpo kaj serioza faka kunlaboro.

Ing. Zdeněk P l u h a ř
landa reprezentanto de TEC,
estrarano de ĈEA respondeca
pri la kontaktoj kun TEC

La latva poeto kaj prozverkisto Aleksandrs Pelēcis, membro de la Unuiĝo de la sovetaĵaj verkistoj de Latvio ekde 1982, skribis al la konata soveta esperantisto Arturs Kubulnieks: "Mi deziras kaj permesas al vi traduki miajn versaĵojn, kiuj estas presitaj en Sovetaĵaj eldonaĵoj, libroj, en la lingvon Esperanto. Samtiel - la tradukojn de mia poezio vi povas sendi al kiu ajn stato, kiel vi mem volas kaj trovas bezona. La poezio devas soni trans limoj kaj Esperanto povas helpi al ĝi soni."

En la 2-a Internacia Akademio Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto (IAKSTE), de la 10-a ĝis la 16-a de aŭgusto 1988 en Pekino, Ĉinio, partoprenis pli ol 1400 sciencistoj-esperantistoj, inkluzive de pli ol cent el 22 landoj ekster Ĉinio. La vespera programo de la Pekina Televido diskonigis la malfermon de la konferenco, kie parolis gvidantoj de la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj membroj de la landa registaro. Fine de la sep tagoj, la konferenco akceptis ok rezoluciojn, interalie, por la fonda de tutĉinia Esperanto-federacio pri scienco kaj tekniko, internacia interliga reto, informcentro kaj internacia universitato. Entute temas pri unika evento, kiu kredeble fundamentos la evoluon de la scienc-teknika agado en Esperanto dum la venonta jardeko.

"Academia Sinica", la Ĉina Akademio de Sciencoj, planas krei internacian universitaton pri scienco kaj tekniko en Pekino. La universitato povos ampleksi ĉiujn sciencojn sen limigo, kun emfazo komence pri administrado, ekonomio kaj teknologio. La plano estas aprobita de la estraro de la Akademio de Sciencoj. Ĝi havas la apogon de la Komisiono pri Scienco kaj Tekniko, kiu estas la plej supera instanco de Ĉinio por tiuj aferoj, ordigita rekte sub la registaro de la lando. La internacia universitato, kun la nomo Internacia Esperanta Scienc-teknika Universitato (IESTU), havos Esperanton kiel ununuran labor- kaj stud-lingvon.

Internacia Informaĉanta Centro de Liŭgou estas fondiĝa de la Esperanto-Asocio de Liŭgou en la dua tagdeko de julio 1988. Ĝi estas ekonomia establo por konsultado, praktikanta sendependajn ekonomian kalkuladon, entreprenadon kaj respondon de profito kaj malprofito. Ĝi stimulas la aplikadon de Esperanto en kampoj de ekonomio, sciencoj kaj teknikoj, negoco k.a. La centro deziras subtenadon de ĉiuj Esperantaj organizoj kaj fondi interrilatojn kun ili. Adreso: Yufang-a Kesto en Liŭgou, Ĉinio, la Internacia Informaĉanta Centro de Liŭgou.

Por grandigi la influon de Esperanto, la 20-jaraj ĝemelaj fratinoj Ŭang Fengju kaj Ŭang Fejsjue, membroj de la Ĉingou-a Esperanto-Asocio, Ljauning-provinco, fondis la Verdstelan Gastejon sub la auspicioj de siaj gepatroj kaj la asocio. En la gastejo eksponiĝas "El Popola Ĉinio", "La Mondo", "Verda Stelo", Esperantaj libroj k.a. Esperantistoj povas ĝui rabaton en la legado. Ili donacos parton de sia enspezo al la Esperanto-movado.

La universitato Karlsruhe de FR Germanio prezentas, ekde la vintro-semestro 1988/89, ankaŭ instruadon de Esperanto. Laŭ indikoj de la universitato, la planlingvo estas instruata en du kursoj por komencantoj kaj por progresantoj.

(Laŭ "Esperanto" kaj "El Popola Ĉinio")



La 22-an de aprilo 1988 d-ro Detlev Blanke prelegis en Praha pri la temo "Sciencia valoro de planlingvoj" en germana lingvo. Invitis la Lingvistika Societo ĉe la Ĉeĥa Sciencia Akademio kaj la Literatura Sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. (der esperantist 150 (4/1988))

Pli ol 200 homoj el 15 landoj partoprenis la Tutpacifikan Kongreson septembre 1988 en Brisbano. Ĉina Esperanto-Ligo, kiu havis kelkajn reprezentantojn ĉe la kongreso, proponis sin kiel la organizanton de la 5-a Tutpacifika Kongreso en 1992 en la havenurbo Qingdao (Ĉingtau). (esperanto 11/1988)

Laŭ raporto de Hyacinthe Seka, ĉ. 150 homoj nuntempe lernas Esperanton en Ebura Bordo: 50 gejunuloj en unu liceo, 42 aliloke en la cefurbo Abiĝano, kaj ĉ. 50 en dek tri aliaj urboj. (esperanto 11/1988)

La 14-an de junio 1988 inaŭgurigis strato Esperanto en nova kvartalo de Eysines, urbo de ĉ. 18000 loĝantoj apud Bordeaux. - Dum aŭgusto 1988 la nacia radio France-Inter elsendis Esperanto-kurson dum deko da minutoj ĉiutage (krom dimanĉo). La kurson gvidis anglo Richard Comerford, instruante la lingvon al la gvidantino de la elsendo, Brigitte Vincent, aŭdigante kantojn kaj premiante telefonvokantojn ĉiusembe per Esperanto-vortaro. (esperanto 11/1988)

En julio Unuiĝo Togolanda por Esperanto partoprenis dusemajnan reorganizan kampanjon de la Federacio de Unesko-klubo, ĝia tegmenta organizaĵo, kaj okazigis specialan kurson por la 205 kunlaborantoj.

Tiun agadon sekvis seminario por kursgvidantoj, kiun partoprenis 20 togolandanoj kaj unu beninano. (esperanto 11/1988)

En Budapeŝto, en aŭgusto 1988, okazis internacia (anglalingva) konferenco "Novaj direktoj en permasina tradukado". Partoprenis pli ol cent fakuloj kaj organizis ĝin la nederlanda kompanio BSO kaj la hungara informadika instituto Societo Neumann. Tial Esperanto kaj la DLT-projekto estis plurfoje tuŝitaj en prelegoj kaj diskutoj. Post erudicia ferma parolado elstara ĉeĥa fakulo Petr Sgall konkludis per la neatendita rekomendo, ke ĉiuj lernu Esperanton. (esperanto 12/1988)

D-ro Humphrey Tonkin, la UEA-prezidanto, farigis la prezidanto de la Universitato de Hartford, en la usona ŝtato Connecticut, ekde la komenco de 1989. Dum la pasintaj kvin jaroj d-ro Tonkin estis la prezidanto de la Kolegio Potsdam, unu el 13 branĉoj de la Ŝtata Univerŝitato de Novjorko. La ĉefkonsilio de Hartford, mezgranda nestata universitato, elektis lin el inter 167 kandidatoj por sia ĉefposteno. (esperanto 12/1988)

Dudekjara farigis la konata germana E-eldonejo Iltis, entrepreno de esperantologo Reinhard Hauptenthal, kies unua titolo en 1968 estis la fama satiraĵo de Kanguruo, Kiel malvenkigi Esperanton? Al la historio gravaj represoj aldonigis esperantologiaj studoj kaj originalaj verkoj, interalie la debatigaj sed brilaj romanoj de Karolo Pic. (esperanto 12/1988)

Jam de du jaroj aperas en Budapeŝto nova revuo "Opus nigrum" sub la redakto de 23-jara István Ertl. En la

revuo jam aperis eks. la hungara traduko de La infana raso de Auld en traduko de Ertl, la eseo de Fjodorov "Survoje", raporto el israela kibuco de esperantista paro, konsideroj pri elesperanta tradukado de W. A. Verloren van Themaat ktp. (esperanto 12/1988)

En Hungario aperis kelkaj verkoj tradukitaj en la hungaran el Esperanto, ekz. romanoj de István Nemes, krimromano Varmas en Romo de Corrado Tavanti (trad. I.Ertl), Kumeuava de Tibor Sekelj, poezia antologio Mi vizitis mian farmon, krome oni komencis eldonadi hungarlingvan kulturan revuon Tekintet (Vidpunktoj). (esperanto 12/1988)

La centra sovetia ĵurnalo Izvestia raportis pri la vigla movado en Mongolio: "La dezirantoj studi Esperanton trovigis tiom multe, ke oni devis malfermi specialajn kursojn ĉe la fremdlingva katedro de la Mongolia Ŝtata Universitato. Al la dujara studprogramo aligis jam ĉirkaŭ cent personoj - instruistoj, kuracistoj, inĝenieroj, laboristoj, oficistoj." (esperanto 12/1988)

Francaj esperantistoj regule partoprenas la grandan lingvofoiron Expolangues, kiu en 1988 allogis ĉ. 28 000 vizitantojn. - Kultura Centro Nantes-Esperanto organizis standon kaj debaton ĉe libro festivalo en Nantes pri la konservo de lingvodiverseco. - Bulgara Esperantista Asocio denove havis imponan standon ĉe la Sofia librofoiro, kie ĉ. kvindek E-titolojn krome ekpoziciis la oficiala ĉina stando, kaj la vjetnama montris unu plian. - Belgaj esperantistoj nun pripensas la memstaran organizaĵon de propra lingvofoiro. (esperanto 12/1988)

Ekde junio 1988, la portugallingva eldono de Ĵurnalo de LBV (Legio de Bona Volo), kiu aperas en 150 000 ekzempleroj, publikigas Esperantokurson de UEA-ĉefdelegito Jorge das Neves. Tiu krome gvidas kurson por 20 oficistoj ĉe la LBV-filio en Rio-de-Janeiro. En la gazeto O Pharol (La lumturo) de la brazila urbo Petrolina aperis serio de 17 rubrikaj pri Esperanto, kun multaj gisdataj informoj pri la movado. (esperanto 1/1989)

En oktobro 1988 en Verona okazis ronda tablo pri "Esperanto en informadiko", kie parolis i.a. Toon Witkam (BSO), Carlo Minnaja (Padova Universitato), Aldo Bergamaschi kaj Giordano Formizzi (Verona Universitato). Ĉeestis la itala vicministro pri trafiko, Angelo Cresco, kiu prezidas la italan parlamentan grupon "Amikoj de Esperanto". (esperanto 1/1989)

La Monda Ŝak-Olimpiado en Graklando fine de novembro 1988 alportis eksterordinaran sukceson al la tri hungaraj fratinoj-esperantistoj Polgar - Zsuzsa (19), Szofia (17) kaj Judith (13). Ili konsistigis plejparton de la hungara virina teamo, kiu lastronde sukcesis venki Sovetunion por la ora medalo. Judith estis la elstara ludanto de la turneo: el dek tri partioj ŝi gajnis dek du kaj egalludis en la cetera. (esperanto 1/1989)

En la jaro 1988 okazis sume 4925 Esperantlingvaj radio-elsendoj per 11 stacioj dum 2045 horoj.

La Pekina Instruista Universitato ekfunkciigis en septembro 1988 nedevidigan E-kurson, kiu dauros unu jaron. La kurson gvidas Licijus, vicprofesoro de la fremdlingva fakultato, kun pli ol 70 lernantoj. (el popola ĉinio 1/1989)

La volumo "Lingvistiko kaj Ideografio" de "Enciklopedio de Ĉinio" eldonita de Ĉinio en februaro 1988 enhavas la artikolojn "Internacia Helpa Lingvo" kaj "Esperanto" skribitajn de Licius, unu el la kompilintoj de la volumo. (el popola Ĉinio 1/1989)

La Hebei-a Esperanto-Asocio fondigis en la 18-a de septembro 1988. Ĝi estas la 26-a provincknivela tiespeca asocio ĝis nun fondita en Ĉinio. - La Scient-tekmi-ka Filio kaj Ekonomia kaj Komerca Filio de la Esperanto-Asocio de la Orientĉinia Instruista Universitato fondigis en la 1-a de oktobro 1988 en Ŝanhajo. (el popola Ĉinio 1/1989)

Antaŭtagmeze de la 8-a de oktobro 1988 kunsidis la membroj de la konsilantaro de la Yangzhou-a Esperanto-Asocio kaj respondeculoj de plumvesta fabriko, ludila fabriko kaj konstrua kompanio de antikvaj ĝardenoj de Yangzhou. En la kunsido la prezidanto de la asocio Weng Yang konigis, kiel la asocio disvolvis la Esperantan laboron en la 3 jaroj post sia fondigo sub la subteno kaj helpo de tiuj entreprenoj, ekz. ĝi komencis traduki servon. (el popola Ĉinio 2/1989)

La fremdlingva fakultato de la Instruista Kolegio de la Dalian-a Universitato decidis funkciigi Esperantan kurson en la dua kaj tria klasoj. 122 studentoj sin anoncis por lernado. S-ro Wang Tailin instruos 3 horojn ĉiusemajne. La kurso daŭros unu jaron. - Lastatempe fondigis la Esperanta Lernejo de Xinjiang-a Ujgura Autonoma Regiono, kies estro estas Cui Shuming, rektoro de la Xinjiang-a Politika kaj Justica Instituto. (el popola Ĉinio 2/1989)

La trakosma usona sondilo "Voyager" trafflugis, en 1987, tri miliardojn da kilometroj kaj en la nuna jaro, 1989, atingos la planedon Neptunon. La sondilo kunportas oran diskon kun la sonoj de la planedo Tero, inter ili krom en aliaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto. Tiun enparolis la tiama aŭstralia konsulo de UNO Ralph Harry. - Kiel konate, en la kosmo surorbitas asteroidoj Zamenhof kaj Esperanto. (jm)

La 2-an de septembro 1988 en Subotica en la 77-a jaraĝo forpasis Tibor Sekelj. Finigis la vivovojo de la homo, kiu tiom longe kaj tiel forte ceestis inter ni, precipe en la E-movado. Trista estis Subotica la 23-an de septembro, aparte por ni esperantistoj, kiuj kolektigis ĉe la enterigo. Tiun septembran tagon tagmeze en la urbodomo de Subotica en solena salono okazis memorkunveno de la Komunuma Parlamento, en kiu la urbo Subotica adiauis sian meritplenan civitanon, riceviton de la premio por vivoverko. La kunsidon krome ceestis pluraj civitanoj kaj esperantistoj el diversaj partoj de Jugoslavio. Pri tre rica vivovojo de Tibor Sekelj parolis prezidanto de la Komunuma Parlamento Josip Palenčar. Posttagmeze kelkcento da civitanoj de Subotica kaj de aliaj jugoslaviasj urboj kolektigis ĉe la tombaro de Subotica por la lasta adiaŭo al Tibor Sekelj. Ĉe la katafalko honore gardostaris konatoj, amikoj, elstaraj E-aktivuloj. En la nomo de UEA parolis prof. d-ro Božidar Popovic. Poste parolis la direktorino de la Domicila muzeo, kiun siatempe gvidis Tibor Sekelj kaj multe kontribuis al ĝia antaŭenigo. En la nomo de esperantistoj de Subotica lastajn salutvortojn eldiris d-ro Tamas Korhecz. Fine la adiaŭajn vortojn eldiris ankaŭ reprezentantino de la Serbia Verkista Asocio. La 24-an de septembro en Beogrado okazis memorkunveno de la Prezidentaro de Jugoslavia Esperanto-Ligo. Pri la personeco de la veterano parolis Boriša Milicevic. (laŭ Jugoslavia Stelo 4/1988)

Esti esperantisto 60 jarojn estas fenomeno tre rimarkinda. La sesdekjaran esperantistecon ĝisvivos nunjare (1989) la prezidanto de la Lingva komisiono de ĈEA s-ano Adolf Stanura kaj la komitatano de EK en Praha s-ano Ladislav Kynšl. Gratulon al ambaŭ! (jm)

Belajn novjarajn bondezirojn sendis al ni Arturs Kubulnieks kaj Svetlana Pogorelaja el Sovetunio, Mirosław Tomaszewski el Pollando, Karel Strouha el Naĥod kaj aliaj. Al ĉiuj ni dankas kaj deziras same sanon, pacon kaj feliĉon. red-

Ni recenzas

Litovio hodiaŭ - 1987-2(29) - Vilnius, eldonejo "Mintis" - Litova Socio de Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlandoj, 1987. La revuo estas eldonata en la rusa, angla, germana, Esperanta kaj franca lingvoj.

Antaŭ nelonge mi acetis belaspektan kolorkovrilan bresuron kun titolo: Litovio hodiaŭ 2(29) 1987. Temas pri enhavorica 96-paĝa magazino pri la soveta Litovio. Komence mi iom embarasigis: mi havas jam la 29-an numeron, sed neniam antaŭe mi audis aŭ legis pri ĝi; mi tute ne sciis, ke tia belega magazino en Esperanto entute ekzistas. Nur la averto sur la lasta pago trankviligis min: kvankam ĉi tiu numero notita per cifero 29, ĝi estas la unua en Esperanto - la pli fruaj numeroj ne estis tradukataj en la internacian lingvon.

Kun tiom pli granda scivolemo mi do foliumis la kajeron, rigardis la kolorajn kaj nigrablankajn fotojn kaj legis artikolojn, proksimigantajn al mi la nuntempan socialisman Litovion. "Litovio - laŭ vojo de Granda Oktobro" estas frontartikolo de V. Sakalauskas, Prezidanto de Ministra Konsilio de Litova SSR. El la artikolo mi eksciis pri la progresoj de Litovio dum la soveta regado ekde la jaro 1940. Nun en la urboj loĝas 66 procentoj da tuta respublika loĝantaro, t.e. preskaŭ trioble pli ol en la jaro 1939. Produktado de elektroenergio, kompare kun la jaro 1940, kreskis pli ol 200-foje. Kvankam nun en litova agrokulturo laboras ĉirkaŭ kvinono de ĉiuj laboristoj (en lastaj jaroj de burĝa regado laboris tri kvaronoj), tamen ili produktas pli ol 2,5 da fojoj pli da agrokulturaj produktoj ol en la jaro 1940.

En artikolo "Litovoj - partoprenintoj de Oktobra Revolucio kaj Civila Milito" mi konatigis kun vico da litovaj revoluciuloj kaj vidis ankaŭ iliajn fotojn. Pri la nuntempa Litovio rakontas la artikoloj "Renkontiĝoj", "Misio de la Amikeco", "Ŝiauliaj kaj ŝeulejanoj" kaj "Luboroj de litovaj brutbredistoj".

Al sciencaj kaj kulturaj temoj estas dediĉataj la artikoloj "En astronomio - Vilniusa multkolora", "Litova lingvo en la mondo", "La ponto de literatura interkomunikigo", "Litova vitralo", "Kanto de kantoj", "Litovaj ekslibrisoj" kaj "Lignaj ludiloj". En la magazino troviĝas ankaŭ specimeno de la nuntempa litova literaturo, novelo de Juozas Aputis "Vekigo antaŭvespere".

Aliaj artikoloj okupiĝas pri sporto (Trofeoj akiritaj ... per basketoj), naturo (En frataro de arboj), kuirarto (Receptoj de litovaj manĝoj) kaj humuro (desegnitaj humuraĵoj).

Sed ne mankas ĉi tie ankaŭ Esperantaj temoj: "Revuo pri litova esperantista agado dum 1986", "Centjarigo de Esperanto", artikolo de L. A. Skupas, Prezidanto de Litova Filio de ASE kaj Membro de Internacia Komitato de MEM, kaj "Senlogikaj imitaĵoj el naciaj lingvoj" de A. Vaitila-vičius. La cielasta artikolo vekis mian intereson speciale, ĉar la aŭtoro prezentis plenmanon da ekzemploj de gramatikaj nelogikaĵoj sub la influo de naciaj lingvoj. Tiaspecaj artikoloj estas ĉiam tre interesaj kaj gravaj, ĉar ili kontribuas al bona kaj efektive internacia lingvouzo en Esperanto. Inter la nelogikaĵoj la aŭtoro mencias la vorton "eksterlando", ĉar ĝi estas uzata singulare, kvankam en la mondo ekzistas pli ol

156 landoj. Vere, jam kelkfoje frapis min la pluralforma vorto "eksterlandoj" en litovaj eldonaĵoj; mi sentis tiam, ke la landojn oni komprenas individue, unuope. Kontraŭe en la ĉeĥa lingvo ni uzas vorton, kiu laŭsignife estas "translimejo"; evidente sub tiu ĉi vorto ni komprenas la eksterajn landojn kiel unu tuton, senkonsidere kiom da ili efektive estas. Sed ĉar en Esperanto estas ĝenerale uzata la esprimo "eksterlando", ankaŭ ni uzas ĝin por nia "translimejo" kaj ni komprenas per ĝi singulare la tuton de ĉio, kio estas "ekster la/nia lando" - do "eksterlando". Se ni volas esprimi la landojn plurale, ni preferas formojn kiel "eksteraj landoj, translimaj landoj, fremdaj landoj" ktp. Nur la pli ofta uzo de Esperanto en la estonteco konfirmos, kiu el la formoj estas pravigeblaj, ĉu "eksterlando", aŭ "eksterlandoj", aŭ ambaŭ.

La numero de magazino "Litovio hodiaŭ" havigis al mi abundan legadon kaj multajn diversflankajn sciindaĵojn pri la nuntempa Litovio. Kaj ĉion en tre bona kaj belaspekta formo kaj precipe en bona kaj senripoca lingvaĵo, pri kiu meritas la tradukinto de la tekstoj Konstantinas Pucdėnas. Nur unu mankon en la numero mi trovis, nome mankon de indiko pri la aperitigo de la magazino: mi ne scias, ĉu ĝi aperas kvaronjare aŭ ĉi-umonate aŭ pli ofte. Sed mi estas konvinkita, ke "Litovio hodiaŭ" apartenas inter la satatajn Esperantajn revuojn. Jiří Patera

Malgranda gvidilo tra la parko de Sanssouci en Potsdam (GDR) estas belaspekta posformata 24-paĝa broŝuro kun mapo kaj multaj koloraj fotografiaĵoj. La E-lingva eldono estas tute identa kun la alilingvaj eldonoj. Ekz. kompare kun la sama ĉeĥlingva broŝuro la tuta arango, la tekstoj kaj fotoj estas egalaj. En la broŝuro oni priskribas la historion de la parko kaj la unuopajn arkitekturaĵojn kaj artaĵojn. Tre bonvena eldonaĵo, havebla ĉe UEA.

Senpage estas ricevebla alia prospekto eldonita en GDR, nome pri la "Naturprotektado en Germana Demokratia Respubliko", multkolora kaj multpaĝa, mendebla ĉe Landwirtschaftsausstellung der DDR, agra-buch, Raschwitzer Str. 11/13, Markkleeberg, DDR-7113.

Nova reviziita eldono de broŝuro NORVEGUJO aperis. Grandformata kun ok paĝoj da kolorbildoj kaj 16 paĝoj da teksto pri la lando kaj popolo, trafiko, homoj kaj medio, historio, reĝimo kaj ekstera politiko, ekonomio, kulturo, publika sano kaj sociaj bonoj, edukado kaj reserĉo. La broŝuron, pri kiu oni povas fieri, eldonis Reĝa Norvega Ministerio pri Eksteraj Aferoj. Ĝi estas senpage havebla ĉe Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schousv. 1B, 0572 Oslo 5, Norvegujo.

V loňském 6. čísle Starta jsem na str. 10 uveřejnil kritiku inzerátu S. Linhart, kterou nám poslal L. Bala. S. Linhart na ni odpověděl takto: Estimata sinjoro, jsem si vědom toho, že svým individuálním postupem jsem vešel i Vámi negativně ve známost inzerátem, psaným poněkud heslovitě a podráždil některé esperantisty. Není Vám ale známa ta skutečnost, že jsem tímto činem získal přes padesát nových zájemců a prakticky dokázal, že v propagaci je třeba se zlepšit. Kun saluto Linhart.

Kun granda plezuro ni prezentas al vi LEGION DE BONA VOLO.

De antaŭ preskaŭ duona jarcento IBV grava laboras por Brazilo kaj aliaj Sud-amerika landoj sur la spirita, morala kaj socia kampoj. Ni havas vartejojn, hejmojn por gemaljunuloj, metikursojn kaj aliajn agadojn, kiuj celas la valorigadon de la homo, kaj honoras la plej noblajn idealojn pri Frateco. IBV naskigie por ami kaj esti amata, tial la popolo helpas al la tenado de ĝiaj assistaj agadoj.

Kiel produkto de tiu nobla laboro IBV inaŭguras la 21-an de Oktobro 1989, en Brazilja, Federacia Distrikto, Brazilo, la **TEMPLO DE BONA VOLO**, marko de unuiĝo inter ĉiuj popoloj de la Tero. Al tiu Monumento de Universala Solidareco alvenos eminentaj homoj el la tuta mondo, por koni tiun simbolon de evoluo de la homaro en ties konstanta strebado al Paco.

Dum la tuta jaro 1989 ni realigos vastan kampanjon por diskonigi la inaŭguron de la Templo.



En Brazilja, Federacia Distrikto, grava evento antaŭanoncas la estigon de nova erao en la Homara Historio.

Tio estas la Templo de Bona Volo, ŝepedra piramido, havanta ĉirkaŭ 26 metrojn da alte, en la Brazilcentra Altebenaĵo.

Ĝia inaŭguro okazos je la 21-a de Oktobro 1989 ĉe la vibrado de interfratiĝo de miloj da Homaj Estaĵoj, kiuj tie ĉeestos.

Nomata ankaŭ Templo de Senlima Ekumenismo, TBV, laŭ koncepto de la matematikisto, fizikisto kaj metapsikologo profesoro Raimundo Nonato Eirado, estas sendube "la verko de la jarcento", ne nur pro sia materia granda, arkitektura amplekso kaj konstruofacileco, sed ankaŭ pro sia signifo en la Homara Historio, kiu estas la Ekumenismo sen landlimoj rekomendita de Alsiro Zarur ĉe antaŭ la fondo de IBV.

Por pliaj informoj skribu al la Monda Sidejo de IBV: Av: Rudge, 700 - Bom Retiro - CEP01134 - São Paulo/SP - Brazilo.

sekcio de invalidoj

LA RENKONTIĜO EN HODONÍN

En la tagoj de la 1-a ĝis la 7-a de novembro 1988 okazis sub la patroneco de ĝenerala sekretario de Asocio de Invalidoj Matěj Kruml internacia renkontiĝo de Esperantistoj-invalidoj en Hodonín apud Kunštát. La renkontiĝon partoprenis 44 E-invalidoj, el ili estis 18 eksterlandanoj /Bulgario, Francio, Hungario, USSR/. La renkontiĝon garantiis BO de ĈEA =Paco kaj amikeco= en Slaný.

La organizintoj preparis riĉan programon. Antaŭteĝmeze okazis instruado de E-to en 6 konversaciaj rondetoj aranĝitaj laŭ lingva nivelo de unuopaj ĉeestantoj. Oni envicigis instruadon helpe de komputilo kaj magnetofono. Posttageze laboris diversaj fakaj rondetoj /ekz. ŝakistoj, Jogo, manlaboroj/, s-ino Rýznarová projekciis diazitivajn pri UK en Roterdamo.

Interkona vespero okazis marde kaj ĉiu ĉeestiĝo prezentis sin al ĉiuj. S-ino Scheidel el Francio transdonis ankaŭ sinceran saluton kaj donaceton de urbestro de Betschdorf, granda favoranto de E-to. Si transdonis ankaŭ sian propran donaceton. La merkreda vespero estis dediĉita al sovetiaj gastoj, kiuj en improvizata aktorado prezentis sian landon. Jaude prezentis Francion s-ino Schneidel helpe de diazitivaj. Sabate vespere recitis, kantis kaj parolis niaj hungaraj amikoj prezentante sian landon. Dimanĉa fermvespero apartenis al gastigantoj, kiuj komencis sian programon per saluto kaj bondeziro al sovetiaj amikoj okaze de ilia ŝtata festo. En nia programo ni konatigis ĉiujn kun nia E-movado kaj laboro de Asocio de Invalidoj. Kiam finiĝis la programo, "eksplodis" granda tombolo, kiu amuzis ĉiujn ĉeestantojn.

Vendrede la plimulto da ĉeestantoj partoprenis la tutagan ekskurson al Brno. La tuta renkontiĝo trapasis en agrabla kaj amika atmosfero, kiu entuziasmigis ĉiujn. Al tiu atmosfero kontribuis ne nur ĉiuj partoprenintoj sed ankaŭ la personaro de la refreŝigejo, kiu zorgis pri kontenta restado de ĉiuj en senbariera luksa medio.

La gastigintoj havis eblon dokumenti altan nivelon de zorgo, kiun dediĉas Asocio de Invalidoj en ĈSSR al siaj membroj. Lunde ni adiaŭdis ĉiujn. Do, ĝis la revizio venontjare en Česká Třebová.

LA BAZA ORGANIZO DE ĈEA =PACO KAJ AMIKECO= PREZENTIĜAS

Fine de la jaro 1987 fondiĝis en Slaný nova BO de ĈEA. Nia nova organizo koncentras siajn fortojn precipe al disvastigo de E-to inter invalidaj kuncivitanoj. Tio signifas instrui kaj uzadi E-ton kaj ebligi al niaj membroj praktike apliki siajn konojn. Tiucele oni aranĝas la bezajn kaj pliperfektigajn E-kursojn ne nur por civitanoj sed ankaŭ precipe por invalidoj de aliaj lokoj surbaze de perleteraj kursoj. Kunlabore kun la sekcio de E-invalidoj la BO prenis sur sin la zorgon garantii pluan edukadon de E-invalidoj el la tuta respubliko.

Al nia BO aniĝis ĝis nun 96 regulaĵoj kaj subtenantaj membroj, kiuj helpas al ni realigi la cefan celon, t.e. instrui kaj uzi Esperanton kiel internacian lingvon.

Tiacele krom kursoj ni aranĝas ankaŭ renkontiĝojn de niaj membroj kaj ceteraj interesatoj por ke ili praktike pliperfektigu en Esperanto. La unua renkontiĝo en Slaný okazis septembre 1988. Ĝin partoprenis 20 gesamideanoj el la tuta respubliko. La dua renkontiĝo, internacia, okazis novembre en refreŝigejo de Asocio de invalidoj en kunlaboro kun la sekcio de E-invalidoj de ĈEA. La renkontiĝon partoprenis 26 sekcianoj kaj 18 eksterlandanoj.

Kaj kion la BO preparos por la jaro 1989? - Ni efektigos renkontiĝojn laŭ regionoj ekz. Plzen, Ostrava, Praha, por rulseĝuloj renkontiĝon en senbariera medio, preparos lernohelpilojn por kursantoj kaj daŭre disvastigos Esperanton inter invalidoj.

Jana Malínská

Esperantistoj en "Resaniga Centro" en Hrabyně

De pasintjara februaro - post pli longa paŭzo - denove ekkunvenis esperantistoj en "Resaniga Centro" en Hrabyně, distr. Opava. Instruadon gvidas membrino de E-rondeto Ostroj en Opava, s-ino Magda Grimová, kiu ĉiun duan semajnon veturas aŭtobuse al Hrabyně. Komence kunvenadis 2-3 virinoj, nun partoprenas la kunvenojn 6 gesperantistoj, el tio 2 komen-cantoj. Tiuj lernas laŭ lernolibro de T. Kilián, ceteraj konversacias laŭ broŝureto "La mondo rakontas".

Dum la jaro 1988 la gesamideanoj el RC kolektis malnovajn okulvitrojn por "Agado EĴ". La kolektitaj okulvitroj estis transdonitaj al E-rondeto en Opava, kiu kun sia kontribuo prizorgis transporton de la okulvitroj al d-ro Horský el Praha - sume oni kolektis pli ol 80 pecojn.

En novembro 1988 vizitis la esperantistojn en Hrabyně kvin gastoj - handikapitoj el Sovetunio, kiuj estis en RC tri tagojn. Okazis solena kunveno kaj rakontado de ĉiuj ceestantoj, komuna kantado kun gitarludo kaj malgranda gastigado. La gastoj trarigardis ankaŭ konstruaĵojn kaj ĉirkaŭaĵon de RC kun fabriketo "Meta" - speciale destinita por invalidoj - kaj plurfoje renkontigis kun gesperantistoj por rakonti kaj kanti re- ciproke.

Ankaŭ en tiu ĉi jaro la gesamideanoj en Hrabyně kunvenadas regule kaj konsente kun E-rondeto en Opava ili farigis anoj de tiu ĉi rondeto (antaŭe kelkaj el ili membris en E-klubo Ostrava-Vitkovice). Ĉiuj jam antaŭ fino de la jaro pagis siajn ĈEA-membrokotizojn pere de E-rondeto Ostroj.

La 19-an de januaro vizitis la esperantistojn en RC s-ano Smetana el Ostrava, kiu rakontis pri kelkaj esperantistaj renkontiĝoj kaj pro- jekciis kolorajn diapozitivojn. Post la programo oni komune kantis.

Estis promesite, ke nunjare vizitos la esperantistojn en Hrabyně
ankau ceteraj membroj de la rondeto en Opava kaj preparos por ili amuzan
renkontigon. Grim

Bona amiko

En Aŭroro - la gazeto por blindaj geesperantistoj numero 5/1988 - mi legis artikolon fare de s-ano Vlastimil Trávníček pri bona amiko. S-ano Tomas Witt estas vidanta esperantisto el GDR, kiu ellernis la brajlan skribon. Tuj li komencis korespondi kun blinda esperantisto s-ano František Skoumal el Bludov. La germana amiko proponis al li, ke li povus transkribadi el diversaj nigrepresataj esperantaj gazetoj la plej interesajn artikolojn en punktan skribon. Ne daŭris longe kaj la germana amiko plenumis sian promeson. En tiu ci tempo cirkulas inter ni - cehaj blindaj esperantistoj - ducent pagoj de lia laboro, kiu donadas al ni eblecon ekkoni el pagoj de "Balta maro", "Saksa kuriero", "El popola Ĉinio" kaj ankaŭ el nia "Starto" diversajn informojn pri aferoj, kiuj estas alie por ni neatingeblaj. Ĉu estas necese al tio ankoraŭ ion rimarki? Dankon al vi, bona amiko! Miloslav Zemčík

Memservado en kuracbano.

Kuracbano "SELTERS" estas situata en montaro Harghita (Rumanio). Ĉi tie estas multaj mineralakvaj fontoj.

La akvo enhavas feron, sulfon, karbacidon kaj ceterajn mineralaĵojn. Ekzistas krome baseno kun bioaktiva fanga akvo. La baseno estas malgranda, la dimensioj estas 10x10 metroj, la lateroj kaj la bazo estas el ligno faritaj kaj en la mezo estas granda fajrujo por varmigi la akvon. La fajrujo havas altan fumtubon kaj la pordo estas ekstere lokigita. Maltene la unuaj banĝastoj ekflamigas la fajron en la fajrujo kaj iuj gastoj dum la tago kunportas sekan brullignon el la ĉirkaŭa arbaro por persistigi dumtage la fajron.

La kuracefiko de la mineralakvoj dankeblas ĉefe de sulfenhavo. Oni aplikas - interne - en kazoj de galenfunkciaj perturboj, stomakmalsanoj kaj kronika mallakso. La fanga akvo estas aplikebla en diversaj formoj de reŭmatismo (ekstere). Mi persone elprovis kaj post tri banoj jam tre multe cesis la doloro de mia sultro (skapola-humera periartrikito) kaj post du semajnoj tute sanigis!

Somere ĉiu ajn povos elprovi ĉi tiun sanigilon. Ĝi estas trovebla je 18 km de urbo CDORHEIU SECUIESC (distr. Harghita). Loĝeblecoj estas en kabano au en propra tendc.

D-ro Ĉaba BIGE
3280, SING. de PADURE
Jud.: Mureş
Romania

Sur la kovrilo:

D. Perevalov kun sia edzino vizite en Ostrava ĉe E-monumento dediĉita al
J.A. Komenský

D. KOČVARA 60-jara!



Nia fame konata kaj ciam juna samideano
Drahomír K o č v a r a estas jam 60-jara!
Poeto iam skribis pri li:
Drahomír Kočvara, gaja Dionizo,
de l' dancavidaĵ inoj ideal',
de bonhumoro sana integral',
per spritfontan' vin atakos sen avizo!

Li 60-jariĝis jam la 29-an de januaro
kaĵ tial malfrue sed tiom pli sincere
ni deziras al li firman sanon kaĵ multajn
fortojn por plua poresperanta aktivado.

1. Dr. Kočvara prelegas, aŭskultas s-ano Taraba
2. En la soveta televido
3. Interŝanĝo de donacoj kun d-ro Ferenczy en Vítkovice
4. En amika rondo
5. Ĉe tombo de Zamenhof dum la UK en Varsovio 1987

KONVERSACIO POR PROGRESINTOJ



Dudeka temo: INTERNACIAJ KONTAKTOJ

La evoluo de internaciaj kontaktoj rilatas al evoluo de civilizo kaj kulturo. Kiam estis inventitaj fervojo, aŭtomobilo kaj aviadilo, do la vojaĝado farigis pli facila kaj povis okazi personajn renkontiĝoj de diverslingvanoj, kiuj ne estis tiel riĉaj. Pli frue oni vojaĝis nur pro laboraj celoj kaj ĉiu vojaĝo, eĉ tiu per sipo, estis aventuro. El tiu mezepoko oni konas precipe ekleziajn konciliojn, en kiu oni parolis latine kaj kiujn partoprenis riĉaj superaj pastroj. Oni ankaŭ konas pripacajn kongresojn, sed oni malmulte scias, kiel la ĉeestantoj, plej ofte nobelaj diplomatoj, interkomprenigis, precipe kiam la hegemonio de la latina lingvo ĉesadis. Ceteraj homoj vivis en servuteco, el kiu ili klopode liberiĝis. El ili nur malmultaj vojaĝis, plej ofte nur komercistoj, kiuj estis pli liberaj, kaj soldatoj, kiuj en sia emeriteco rakontis pri eksterlando. Vojaĝado kiel hobbio ne ekzistis, ĝi estis aventuro de esplorantoj aŭ homoj, kiuj serĉis pliriĉigon. Turismo ekzistas iam pli ol cent jarojn. En multnaciecaj ŝtatoj estis strebado, ke ŝtatoj uzu lingvon de nacio plej nombra. Same agis Europanoj en kolonioj kaj entrudis sian lingvon al indigenoj. Komprenible estis esceptoj, entuziasmoj strebis savi lingvojn de subigitaj nacioj, sed tio ne sukcesis ĉie kaj ĉiam, same kiel ne ĉie estis malpli nombraj lingvoj forigitaj.

Kiam do la personaj renkontiĝoj estis pli eblaj, aperis bezono de interkomprenigo inter diverslingvanoj. Interpretado ekzistis jam antaŭe en duopaj kontaktoj, sed nun ĝi estis nepre bezona, eĉ se la konversacio plilongigis. Pro prestiĝoj oni malfacile trovis komunan oficialan lingvon, tial aperis multaj projektoj de artefaritaj lingvoj, kiuj simpligis la gramatikon kaj iam eĉ ekzistantan lingvon. Sed nur Esperanto ekzistas ĝis nun. Volapuko, kiu estis antaŭ Esperanto, tute malaperis, eĉ se ĝi estis tiam sufiĉe disvastigita. Vivetas aliaj projektoj, kiuj asertas, ke ili plibonigas Esperanton, sed la praktiko ne konfirmas tion. Tamen la efikado de Esperanto estas ĝis nun nur hazarda, ĉeokaza, pli ofta estas interpretado. Dank' al tekniko ekzistas en ejoj por renkontiĝoj kaj kunvenoj aŭdilsistemoj. Oni elektas per speciala radioaparato deziratan lingvon, kiun interpretas homo sidanta en speciala akustika kabino. La sistemo estas komplika kaj multekosta, oni iam enkundukas oficialajn lingvojn kaj laborlingvojn, sed la malfacila senprokrasta interpretado restas. Se renkontigas du diverslingvaj ŝtatestroj, ili malofte dialogas "inter kvar okuloj", preskau ĉiam estas unu aŭ du interpretistoj. Oni povas konkludi, ke persistado de interpretado estas pro prestiĝoj, ĉar neniu konsentas pri hegemonio de ia ajn lingvo.

Esperanto proponas per siaj kongresoj kaj renkontiĝoj de diversaj sekcioj facilan interkomprenigon sen interpretado, sed ĝis nun la internacia publiko ne akceptis ĝin generale malgraŭ kelkaj favo-

raj aproboj kaj rekomendoj. Kritiko kaj riproĉoj estas diversaj, unu kritikis "artefaritecon". Tial Esperantistoj preferas paroli nun pri "planlingvoj". Ili diras prave, ke ĉiu lingvo, kiu estas uzata publike, en literaturo kaj en radio aŭ televido, estas artefarita. Nome naciaj lingvoj evoluis el dialektoj, iam sufiĉe diferencaj, kiuj aŭ malaperis aŭ memstarigis, ĉar oni nepre starigis "literaturan lingvon", unu aŭ pli, do ĉion "artefaritan". Tial oni parolas, ke en la mondo ekzistas 2000 ĝis 4000 diferencaj lingvoj. Nome la nombro ne estas preciza, ĉar ofte mankas limoj inter dialektoj kaj literaturaj lingvoj. Tamen dum kelkajn lingvojn parolas malmultaj, tiuj estas disvastigitaj eĉ inter alilingvanoj, do ili funkcias en certa teritorio kiel interkompreniĝaj lingvoj: angla, franca, hispana, araba, malaja, rusa, ĉina, germana, itala, certe eĉ aliaj.

Esperanton oni ĝis nun propagandas, tial ekzistas Esperanta movado kaj diversaj organizoj de Esperantistoj. Neŭtrala estas Universala Esperanto-Asocio UEA, kiu organizas ĉiujare Universalajn kongresojn UK kaj eldonas "Jarlibron", en kiu estas la strukturo kaj multaj informoj pri la Esperanta movado. Ĝi havas instancojn, sekciojn, asociojn landajn kaj fakajn, iuj kunlaboras kun UEA, aliaj ne estas ligitaj, fakaj asocioj eluzas Esperanton por sia fako aŭ propagando. La sistemigo estas tre detala, riĉa estas ankaŭ Esperanta literaturo, neniu alia planlingvo havas tian sistemon de la estraro. Eĉ se kelkaj fakaj renkontiĝoj parolas pri interkompreniĝado per muziko, faka terminaro, matematiko, tamen ili bezonas komunan lingvon, do fakaj asocioj montras utilecon de Esperanto. Por amikaj kaj labora korespondado ebligas Esperanto kontakton kun preskaŭ ĉiuj landoj. UEA havas delegitan reton, kiu ofertas multajn ŝervojn. Pazigrafio, bilda simbolaro komprenebla al ĉiu ja ekzistas en trafiko kaj en stacioj kaj haltejoj, sed tiu efikado estas limigita. Ĝi ne povas anstataŭigi Esperanton, kiu uzas la latinan alfabeton, entute estas 28 literoj, 5 literoj havas tegmentan supersignon, 1 litero estas kun arka supersigno. Ĉiu litero havas sian gondon, diferencon de aliaj, oni skribas principe tion, kion oni aŭdas.

Nun oni strebas traduki eĉ per komputiloj. Por kontaktoj kun komputiloj estis elpensitaj komputilaj lingvoj sur bazo de la matematika lingvistiko. La traduko per komputilo estas hakmaniera, sufiĉas por teknikaj kaj aliaj instrukcioj. Sed Esperanto kapablas traduki eĉ beletrion.

GRAMATIKO:

1. Trovu vortojn, la kiu oni povas meti la sufikson -em- kaj uzu ilin en dek frazoj
2. Skribu parton de la temo en estinteco, alian en estonteco

STILO:

1. Skribu al via leteramiko, ke vi volas renkonti lin dum ia internacia Esperantista renkontiĝo
2. Skribu pri la organizo de Esperantistoj en via lando
3. Desegnu aŭ pentru dek simbolojn el iu stacio aŭ ŝoseo kaj klarigu ilin. Vi povas trovi ilin ankaŭ en fervoja veturhoraro

DEMANDOJ:

- +1 Kiom da leteramikoj vi havas en eksterlando? En kiuj landoj?
- +2 Ĉu vi estas ano de Esperantista organizo? Skribu pri tiu organizo
- +3 Ĉu vi ion kolektas? Ĉu vi uzas Esperanton por tiu kolektado?
- +4 Ĉu vi jam parolis Esperante per telefono?
- +5 Ĉu vi aŭskultas radioelsendadon en Esperanto? Kiuj stacioj elsendas Esperante?
- +6 Ĉu vi uzis Esperanton dum via vojaĝado? Ĉu vi uzis servojn de delegito de UEA?
- +7 Ĉu vi konas aliajn Esperantajn jarlibrojn, kalendarojn aŭ gazetojn de unuopaj asocioj?

Josef Chvosta



KORESPONDI DEZIROJ ANONCOJ

Mi acetos libron "La Nova Testamento", eĉ pli malnovan eldonaĵon. Adreso: Pavel Kleissner, Strážkovičká 394, Dolní Pošernice, 190 12 Praha 9, Ĉeĥoslovakio

24-jara polo volas interŝangi poŝtmarkojn, bildkartojn kaj automobilajn mapojn tutmonde. Tomasz Popowski, Pl-87-800 Włocławek, str. Nowomiejska 13, Pollando

34-jara librotenistino, edzino volas korespondi: Ursula Łozinska, 56-420 Bierutów, Ul. E. Plater 13/1, Pollando

21-jara studentino de politekniko interesiĝas pri sporto, kolektas poŝtmarkojn kaj ŝatas legi librojn: Maria Wiatrak, Henryków 11, 63-708 Rozdrażew, woj. Kaliskie, Pollando

17-jarulo volas korespondi: Wojtek Zawalich, ul. 1-go Maja 44/1, 19-335 Prostki, woj. Suwalskie, Pollando

23-jara laboristo interesiĝas pri turismo, literaturo, filmo, kolektas bildkartojn, fotografaĵojn de famaj aktoroj kaj kanzonistoj: Sławomir Karczewski, 15-377 Białystoko, str. Kopernika 7/33, Pollando

Geedzoj 29-jaraj kun infanoj dezirus korespondi kun simila ĉeĥa familio pri turismo, reciproka gastigado: Elisabeta, Jan Mach, poŝtkesto 23, PL 38-700 Ustrzyki, Pollando

34-jara oficistino interesiĝas pri turismo kaj pri Esperanto, kolektas bildkartojn kaj poŝtmarkojn: Elżbieta Grabowska str. Kwitnāca 19 m 26, 01-926 Varsovio, Pollando

29-jara laboristo interesiĝas pri turismo kaj moderna muziko: Grzegorz Adamczak PL 97-400 Bełchatów, str. Zygmunta I 6/41 Pollando

12-jara lernantino interesiĝas pri turismo, literaturo kaj sporto, kolektas bildkartojn, poŝtmarkojn, fotojn, malgrandajn kalendarojn: Karina Buniak, Zwiastowice 44, 48-258 Twardawa, Opole - Pollando

19-jara lernantino interesiĝas pri turismo, literaturo, biologio kaj kemio: Mirosława Zukowska, ul. Kościuszki 90/4, 19-420 Kowale Oleckie, woj. Suwalki, Poll.

28-jara virino kaj ŝia edzo interesiĝas pri turismo kaj pri fremdaj lingvoj:

Krystyna Worobiej, 66-620 Gubin,
Os. E. Plater 12c/15, Pollando

20-jara lernantino interesigas pri turismo, poezio, muziko, plastiko, arkeologio kaj misteraj fenomenoj: Marzena Bociąg, 20-709 Lublin, str. Krasinskiego 10/2, Pollando

12-jara lernantino interesigas pri turismo, literaturo kaj sporto, kolektas bildkartojn, postmarkojn kaj fotojn, malgrandajn kalendarojn: Beata Margasinska, Zwiastowice 2d, 48-258 Twardawa Opole Pollando

37-jara polino volas korespondi kun ĉeĥoslovakoj: Barbara Matyjas, ul. Wielkopolska 7/8, 44-335 Jastrzãbie, Pollando

32-jara fraŭlo, teknikisto volas korespondi kun virinoj, satas muzikon, teatron, kinon, literaturon, turismon: Wiktor Lebiez, ul. Rózyckiego 23/128, 58-506 Jelenia Gora, Pollando

9-jara knabo deziras korespondi tm. pri ĉiuj temoj, kolektas postmarkojn kaj bildkartojn, ludas violonon: Adam Solak, Kollãtaja 19/7, PL-45-064 Opole, Pollando

18-jara gaja knabino interesigas pri muziko, sporto, turismo, Esperanto, kolektas bildkartojn kaj satas legi librojn, volas korespondi en Esperanto: Elżbieta Janusz, Rajsko 250, 32-600 Oświęcim, Poll.

30-jara fraŭlino, estrino de juna grupo deziras korespondi: Alicja Wiaderna, 78-111 Ustronie Morskie, Sianożęty 54, Pollando

35-jara kuracistino interesigas pri turismo, literaturo kaj folkloro: Danuta Szejnik, Burdzikowska, 02 586 Warszawa, ul. J. Dãbrowskiego 75 m 76, Pollando

40-jara ofieistino en muzeo (laŭ profesio instruistino) volas korespondi kun ĉeĥ(in)oj por ekoni proksime Ĉeĥoslovakion kaj precipe Pragon: Wiesława Trypka, 35-208 Rzeszow, ul. Bojanowskiego 14/48, Pollando

18-jara komencanta esperantisto deziras korespondi tutmonde: Arek Kurzajczyk, 64-920 Piãa, ul. Świerkowa 64, Pollando

Fotografové - amatéři, profesionálové: Chcete-li i Vy oslavit 150. výročí vzniku fotografie, zúčastněte se mezinárodní fotografické akce, kterou pořádá Městské kulturní středisko S.K.Neumann v Brně a Fotoskupina FAKT při obvodním kulturním a vzdělávacím středisku Brno III pod názvem:

"Jednodenní přehlídka fotografií ko 150. výročí slavnostního vyhlášení vynálezu fotografie pořádaná pod širým nebem v Brně 19. srpna 1989".

Podmínky účasti:

1. Každý autor může poslat pouze 1 fotografii
 2. Téma volné, technika zpracování libovolná
 3. Každému autorovi bude jeho fotografie vystavena, pokud bude splňovat následující požadavky: - formát minimálně 18 x 24 nebo větší - černobílé fotografie musí být zvětšeny na kartonu/polokartonu by činil problémy při adjustaci/ - rubová strana fotografie nesmí být popsaná a potištěná, aby neprosvitl text, neboť část fotografií bude vyvěšena na šňůrách. Označení fotografií se jmény autorů provede pořadatel - k fotografiím přiložte list formátu A4 s těmito údaji: v následujícím pořadí: 1. jméno, příjmení autora, 2. rodné číslo, 3. adresa, 4. název snímku, 5. rok vzniku snímku, příp. datum, 6. místo vzniku snímku, 7. souhlas s příp. dalším uveřejněním snímku
 4. Fotografie se nevracejí, po skončení přehlídky zůstanou všechny fotografie v archivu MKS SKN a budou sloužit ke studijním a výstavním účelům
 5. Uzávěrka: 20. června 1989
 6. Fotografie s průvodním listem zasílejte na adresu: Přehlídka fotografií Městské kulturní středisko S.K.Neumann, Radnická 4, 656 35 Brno
- Vyřizuje: Beránková, tel. 23925/008

23-jara studentino interesigas pri turismo, literaturo kaj folkloro: Beata Leitloff, 00-905 Warszawa, str. Kanarskiego 49/15 osiedle "Przyjaźń na Jelonkach", Pollando

26-jara laboristo parolas angle kaj fran-
ce, estas nova esperantisto, interesigas
pri pentroarto kaj medicino, kolektas me-
dicinajn librojn: Bogdan Ruszniak, ul.
Stefana Wyszynskiego 13/10, 20-102 Lublin
Pollando

27-jara virino interesigas pri literatu-
ro, geografio kaj turismo, kolektas post-
markojn kaj bildkartojn: Iwona Broniewska,
Stalingradaska 20 m 112, 03-468 Warszawa,
Pollando

17-jara lernantino interesigas pri turis-
mo, literaturo kaj moderna muziko, kolek-
tas bildkartojn, parolas ankaŭ angle kaj
ruse: Joanna Kalinowska, ul. Purmana
69/83 m 20, 87-800 Włocławek, Pollando

21-jara studento interesigas pri elektro-
niko, fotografado, velado kaj turismo,
kolektas postmarkojn kaj monerojn: Krzysz-
tof Pałaszynski, Osrodek Wczasowy "Warmia"
w Kretowinach, PL-14-331 Żabi Rog, Poll.

30-jara instruistino interesigas pri li-
teraturo kaj turismo, kolektas bildkartojn
Wanda Tarkowska, 05-400 Otwock, ul.
Poniatowskiego 3/71, Pollando

Pola geografistino laboranta en bibliote-
ko sercas personojn, kiuj naskiĝis la
22-an de septembro: Elżbieta Kurpińska,
20-126 Lublin, ul. Podzamcze 3/30, Poll.

32-jara flegistino interesigas pri muziko,
tre satas legi librojn: Henryka Marek,
43-190 Mikołów, ul. Młyńska 13/29, Poll.
Atenton! S-ano Teresa Sinkowska sendu
sian adreson.

14-jara lernantino el Kazanlak volas ko-
respondi kun knaboj ĝis 16-jaraj el Ĉeĥo-
slovakio, ŝi interesigas pri muziko, tui-
rismo kaj dancado: Radina Atanasova Dimi-
trova, bul. "M. Tolbuhin" N- 3, vh. 6,
ap. 13, Kazanlak, Bulgario

26-jara fraŭlo deziras korespondi pri
historio, vojagado, folkloro kaj c. t.emoj:
Petar Panajotov, str. Bratja Ĉaplikovi
N- 85, vĥod 5, apt. 16, 4004 Plovdiv,
Bulgario

Kun instruistoj en Ĉeĥoslovakio volas ko-
respondi s-ro Jusuf Dizdarević, instruisto,
ul. M. Piljuĝe 57, 72104 Zenica, Jugosla-
vio

Mungara lernantino volas korepondi kun
ĉeĥa lernantino: Ēva Szűts, Toborzó ú.27
5100 Jászberény, Hungario

Nova Esperanto-posto kaj tradukisto vo-
las korespondi kun ĉs. postoj kaj tradu-
kistoj: Danilov Vladimir Viktoroviĉ
(38-jara), Ulica Socialističeskaja, 87-23
gorod Mozyrj, Gomelbkaĵa oblast',
247764 BSSR, USSR

22-jara fraŭlino interesigas pri turismo,
sporto, psikologio, kulturo, modo kaj
c. t. tutmonde: Daiva Ulevičiūtė,
st. Vėjo 72/1, ur. Kaunas 233000, Lito-
vio, USSR

Volas korespondi Ĵivile Jonuševičiute
(19-jara) J. Janonio 8-22, Palanga 235720
Litovio, USSR

16-jara Ruslan estas filatelisto, inte-
resigas pri la moderna muziko kaj revuoj
pri moderna muziko, pri teniso kaj fut-
balo: Ruslan Zaharov, ul. Olgovskaja
17-12, 248 008 Kaluga, USSR

Pasia kolektanto de bildkartoj, kalenda-
retoj, esperantaĵoj kaj kojnoflagoj (sto-
faj) deziras korespondi kun tuta mondo
en lingvoj: Esperanto, ĉeĥa, germana,
franca kaj itala. Li preferas korespondi
per "Registritaj" leteroj kaj pakajoj.
Anatolio Dovbisĥ, 245110 Schostka - 7,
P. O. Box 27, Ukrainio, USSR

36-jara kolektanto deziras korespondi
kun la tuta mondo pri literaturo, sporto,
moderna muziko, kolektas postmarkojn,
bildkartojn, surgluaĵojn, kalendaretojn,
gramofondiskojn: Juriĵ Korsun, p.Box N 7
u. Shostka 7, Sumska obl. 245110, Ukrainio,
USSR

25-jara studentino interesigas pri filmo,
muziko, modo, kolektas etikedojn, revuojn
pri modo, postmarkojn pri faŭno, futbalo,
zepelinoj: Tanja Krilkova, ul. Marata
25/173, u. Shostka 7, Sumska obl.,
245 110, Ukrainio, USSR

Se vi iam vizitos Litovion, konatigu kun
la klubanoj de "Ondo" en la urbo Kaunas.
Ili gvidos vin en la urbo, konatigos ĝi-
an malnovan historion, nuntempon kaj E-
movadon. Adreso: E.K. "Ondo" c.a.d. 193
SU-233000 Kaunas, Respubliko Litovio,
USSR

Karaj sakamikoj,

Esperanto kaj sakludo havas certe ion komunan: dum mia merkatesploro por plia diskonigo de la internacia lingvo mi konstatis, ke la plej taŭga medio, la plej preta akcepti Esperanton, estas la sakludista medio.

Tia malkovro estas laŭ mi grava en nia nuntempa strategio: ĉiuj esperantistoj sakludistoj povas helpi formante homogenan grupon, kun propra transnacia sak kulturo, iu minoritato kiu provu al makrosocio la valorojn de Esperantio.

Miaflanke, mi klopodas disvastigi Esperanton kaj ĝiajn valorojn tra la italaj sakludistoj, kiuj plejparte montrigis pretajn akcepti ĝin. Laŭ mia kutima laborsistemo mi tion deziras fari per la samaj teknikoj de la moderna merkato au surmerkato. Vasta kono kaj inteligenta informado estas necesa bazo por mia/nia laboro.

La italaj sakrevuoj volonte eldonas artikolojn pri la uzado de Esperanto en sakludo. Pro tio mi devas abunde rikolti informojn pri:

- historio de sakludo en Esperantio
- listo de turniroj kie Esperanto estas baza au flanka lingvo
- listo de grupoj kaj asocioj kie Esperanto estas uzata
- emblemoj, postmarkoj kaj ĉiuj rilatoj inter Esperanto kaj sako, ktp.

Mi alvokas ĉiujn sakludistojn kaj ĉiujn Esperanto-historiistojn sendi al mi dokumentojn, artikolojn, kaj ĉion ajn utila por verki elcerpajn artikolojn pri la temo. Mia laboro, esence itallingve por italaj gazetoj, estos tamen disponebla en Esperanto por Esperantio. Mi antaŭdankas.

Adreso: Dr. Marco Picasso, Via De Gasperi, 7, 20057 Veduggio al Lambro /MI/, ITALIA.

GRAVA ALVOKO

Esperanto-klubo "Kolombo de paco" organizas internacian fotoekspozicion sub titolo "Esperanto, Paco, Planedo, Ni". La ekspozicio devas montri gravan rolon de internacia lingvo kiel ilo de interrilatoj kaj amikeco. Organiza komitato esperas ricevi kolorajn kaj nigrablankajn fotojn de tuta mondo. Nin interesas diversa vivo de Planedo: Esperanto-movado, pacbatalo, beleco de naturo, ekologio, politiko, kutimoj de popoloj, turismo, sporto, ripozo, humuro ktp.

La ekspozicio havos transmovadan karakteron. Post inaŭguro en Dregobiĉ ĝi estos eksponita en kelkaj urboj de Sovetunio kaj poste en multaj landoj de la mondo laŭ propono. La fotoekspozicio funkcios sub protekto de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistoj. Foto-kino-magnetonamatoroj. Venkintoj de la fotokonkurso ricevos premiojn kaj suvenirojn. Aŭtoroj de bonaj fotoj estos invititaj en Sovetunion por inaŭguri la ekspozicion. La partoprenantoj de la ekspozicio ricevos katalogojn. Partopreni la ekspozicion povas profesiaj fotistoj kaj amatoroj de la tuta mondo. Fotoj povas esti diversampleksaj (plej bona formato 30x40 centimetroj). Sendante

fotojn vi devas nomi foton, indiki vian familinomon, profesion, adreson. Estas dezirinde fari fotojn pli malgrandajn por uzi ilin por katalogo.

Fotojn sendu al adreso: Vasil Stanovic
29372Q DREGOBIĈ, Lvov obl. Ukrainio
PK 20 Sovetunio

RIKOLTO en preparo
Okaze de la 75-jarigo de Prof. D-ro Juan Régulo Pérez en Marto 1969, la brazila eldonisto Gersi Alfredo Bays decidis eldoni la kolekton de la Esperantaj artikoloj de Régulo sub la titolo RIKOLTO - projekto iam antaŭvidita en la Stafetoserioj.

Editoroj de la ampleksa volumo estas Reto Rossetti kaj Reinhard Haupenthal. Enkondukon verkos Prof. Gaston Waringhien. Ĉar bibliografiaj antaŭlabroj ne ekzistas (la Bibliografio en Serta I estas tre nekompleta pri Esperanto) necesas traserĉi multajn librojn kaj revuojn. Por faciligi tiun laboron kaj por eviti markojn la teknika redaktoro (R. Haupenthal, Schulstr. 30, D-6601 Scheidt) petas pri atentigoj al artikoloj de Régulo.

Grava internacia Esperanto-Biblioteko urge bezonas jenajn malnovajn numerojn de Starto: jaro 1969 - n-roj 1, 7 kaj 8,

jaro 1970 - n-roj 7, 8; jaro 1977 - n-roj 1, 2 kaj 6; jaro 1978 - n-ro 1; jaro 1983 - n-roj 5 kaj 6; jaro 1985 - n-roj 1,2/3, 4/5, 6. Kiu posedas tiujn ĉi malnovajn numerojn de Staro kaj ne plu bezonas ilin, bonvolu ilin sendi al la redakcio de Staro (adreso de ĈEA). Antaŭdankon!

Por kulturaj arangoj mi ofertas muzikigitan poemaron de Jaroslav Seifert "Dekdu pantunoj pri amo", en Esperanta traduko. Informigu ĉe komponisto Bohuslav Janů, Mládežnická 477, 277 11 Neratovice.

TERMINOLOGIA SEMINARIO

En Poprad (Altaĵ Tatroj), de 12a - 21a de junio 1989 **TERMINOLOGIA ESPERANTO-CENTRO (TEC)** arangos seminarion por organizantoj de terminologia laboro. Inter la 12a (alveno) kaj 21a (forveturo) okazos 7 labortagoj + 1 tuttaga ekskurso.

Skizo de programenhavo:

1. Teoria fundamento: nuna stato de terminologio kiel lingvoscienco kaj lingvo-planada praktiko; teoriaj orientigoj; praktikaj labormetodoj; gisnunaĵ atingo; limoj kaj novaj evolutendencoj.

2. Praktikaj ekzercoj: nokia analizado; ellaborado de nocioj; homonima kaj sinonima analizado; normigado; terminologia eluzado de fakaj tekstoj; kreado de terminologiaj kaj dokumentaj sliparoj (nur-paperaĵ kaj komputilaj).

3. Terminografia projekto: determino de terminologia esplorkampo; determino de terminologiaj fontoj; starigo de miksitaj laborkomitato (fakuloj kaj terminologoj); terminologia pritraktado de fontaj dokumentoj; ellaborado de terminologiaj dogieroj; redaktado de terminara projekto. Ĉeflektoros d-ro E. Brent, Kanado, terminologo kaj lingvokonsilisto ĉe Office de la langue française; Infoterm (Vieno) kaj DLT (BSO, Utrecht) estas reprezentataj.

Rajtas aliĝi ĉiu terminologie serioze interesita esperantisto, sed preferon havos TEC-anoj, speciale reprezentantoj de fakaj kaj landaj E-organizaĵoj kaj aliaj gvidantoj. 30 lokoj disponeblas, laŭeble frua aliĝo helpas tajlori la programon. La kostoj: 990,-- CSK (Kĉs) por logigo kaj mangoj. Ni gastos en la famigantaj, ĵus rekonstruitaj, artmemoraj domoj de Slovaka Esperanto-Asocio, kiu

diveramaniere helpas la sukceson de la arango. Interesitoj skribu al: Wera Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, Pf. 113-05, BERLIN, DDR-1141.

Somera Esperantista Feria/Familia Tendaro (SEFT 1989)

Tempo: 1989-08-19/26; Loko: tendejo C/86 en regiono Feldberg; Kondiĉoj: memprizorgo (tendo, mango); Ideo: Komuna tendado de infanoj, familioj, junuloj, soluloj ktp. en esperantista etoso.

Programo: Migrado tra la arbaro- kaj lagorica naturo, ekskursoj (unu ŝipekskurso), vesperaj kunvenoj, prelegoj, kantoj, fabelhoroj por infanoj ĉi-vespere. Kunportu prelegojn, muzikinstrumentojn kaj aliajn amuzajn programerojn. Ĉar la tutajn programojn la partoprenantoj memstare arangos. Parolu plej ofte Esperante! Partoprenu ĉiutage nian vesperan kunvenon! Alvensbleco: trajne de Berlin aŭ el nordo ĝis Neustrelitz, tie elvagonigi! El Neustrelitz per trajno al urbo Feldberg, de tie piede aŭ per aŭtostop al la tendejo C/86 Thomsdorf. Eksterlandanoj povas aliĝi sur tendejo. Krome bonvolu sendi aliĝilon al Werner Pfennig, Fohlenwinkel 13, Neubrandenburg, GDR-2000.

La 25-a Jubilea Esperantista Feriado en Międzyzgorze

En 1989 okazos tri jubileaĵ feriskipoj, ĉiu por 600 feriantoj:

- Esperanto hejms, 17-30.08.1989 - ĉefe por familioj, instruistoj, lerneja junularo

- Adiaŭ somero!, 2-15.09.1989 - ĉefe por studentoj kaj laboranta junularo

- Ora pola aŭtuno, 17-30.09.1989 - renkontigo de diversaj generacioj.

Partoprenkotizo por civitanoj de Ĉeĥoslovakio estas 2500-3395 kronoj. Aliĝojn akceptas kaj detaliajn informojn sendas: Pola Esperanto-Asocio, P.O. Kasto 16, ul. Dubois 3, PL 50-952 Wrocław 17, Pollando.

La feriadon iniciatis kaj daŭre okupigas pri ĝiaj organizaj problemoj la konata pola esperantisto Edward Woytakowski. Komence estis organizata unu septembra feriskipo, ekde 1982 oni organizas augustan feriskipon por ebligi partoprenon al instruistoj kaj lerneja junularo.

SPORTO SPORTO SPORTO

La 27-an de januaro 1989 okazis en Prago la urba ĉampioneco en judo. Inter la partoprenantoj estis membrino de la praga junularo s-ano Vlasta Pištíková. En la pez-kategorio ĝis 72 kg ŝi gajnis la 2-an lokon. Gratulon!

En tagoj la 18-a kaj 19-a de marto 1989 estis en Berlino aranĝita semajnfina sakturniro de esperantistoj. Oni ludis per sistemo ĉiu kun ĉiu kaj ĉiu ludanto havis 20 minutojn je la saktpartio. Ĉeestis 11 esperantistoj el diversaj urboj de GDR kaj reprezentanto de la Praga E-klubo s-ano Štěpánek. En la turniro venkis la majstro-kandidato s-ano Matthias Hahlbohm el Berlin. S-ano Štěpánek gajnis la 4-an lokon. Dank' al s-ano H. Schilling la turniro estis bone preparita kaj ankaŭ premioj estis belaj. Ni povas rekomendi al ĉiuj esperantistoj, kiuj satas saktludi kun bonaj rivaloj, ĉeesti tiun saktturniron venontjare.

Unu el la ĉi-jaraj Esperantaj biciklaj karavanoj ekiros, la 15-an de junio de la norvega Trondheim, kaj trapasos Surnadal, Oslo kaj Gotenburgon por atingi la Internacian Junularan Kongreson en Kerkrade, Nederlando (16. - 23. Julio).

36 JARON EN LA SERVO AL LA ESPERANTISTARO



La 4-an de aprilo 1959 komencigis la regulaj ĉiutagaj elsendoj en Esperanto el Varsovio.

Nun RADIO POLONIA elsendas ĉiutage ses duonhorajn programojn, kiuj enhavas variajn elsendaĵojn pri la vivo en Pollando, pri la pola ekonomio, kulturo, literaturo, muziko, sporto ktp., sed ankaŭ pri la internaciaj eventoj kaj pri la pola kaj internacia Esperanto-movado. Provu auskulti iun el la ses programoj matene je la 7.30 h (audebla ankaŭ sur meza ondo 200 m), tagmeze je la 13.00 h, posttagmeze je la 17.30 kaj 18.30 h kaj vespere je la 21.30 kaj 23.30 h (la lasta ankaŭ sur meza ondo 200 m).

Skribu al Radio Polonia kaj petu senpagan elsendohoraron. Adreso: RADIO POLONIA, Esperanto-Redakcio, Box 46, 00-950 VARSOVIO, Pollando.

STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská str. 10, CS-110 01 PRAGO 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6-foje jare. Redakta komitato: Karel FRANC, Jiří HANOUSEK (grafika aranĝo), Ing. Vlastimil KOČVARA, Miroslav MALOVEC, Jiří PATERA (respondeca redaktoro) kaj Helena ŠTRUNCOVÁ. Presas OKP-6 Liberec. Transdonita al presejo 1989-03-31. Jarabono 36 CSK, por eksterlando 48 CSK aŭ 14 NLG, inkluzive de sendkostoj. Abonantoj turnu sin al niaj perantoj, al UEA aŭ rekte al nia asocio.

STARTO - nepravelelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 01 PRAHA 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Redakční rada: K. Franc, J. Hanousek (grafická úprava), Ing. V. Kočvara, M. Malovec, J. Patera (odpovědný redaktor) a H. Štruncová. Povolen odborem kultury NVP č. 310008385 ze dne 18.3.1985. Tiskne OKP-6 Liberec. Předáno do tisku 31.3.1989. Dohledací pošta Praha 07. Snižovaný poplatek za poštovné povolen Ředitelstvem pošt Praha pod č.j. P/1-1267 ze dne 6.4.1979.

<u>M. Gorbacov: Surbaze de plena egalraiteco. suvereneco. reciproka respekto</u> Projev pronesený v Bělehradě 16.3.1988	3,- Kčs
<u>M. Gorbacov: Realo kaj garantioj de la sekura mondo.</u> Stat věnovaná mezinárodním otázkám.	3,- Kčs
<u>Armea generalo Ludvík Svoboda</u>	1,50 "
<u>Por paco, internacia sekureco kaj nacisendependeco.</u> Projevy a statě vietnamských politiků k mezinárodní situaci.	5,- Kčs
<u>La legenda militestro.</u> Hodnocení přínosu J. B. Tita k vítězství nad fašismem.	
<u>Litovio hodiaŭ.</u> Nové číslo nového časopisu v esperantské verzi.	10,- Kčs
<u>K. Čapek: Rakontoj el la unua kaj dua poso.</u> Vondrouškův překlad obou světoznámých knih povídek našeho klasika.	27,- Kčs
<u>K. Čapek</u> Přehledná informace vydaná ke 100. výročí esperanta, obsahuje bibliografii, životopis a ukázky z děl	5,- Kčs
<u>P. Cvirka: Koko kantisto kokerikisto.</u> Litevské pohádky, ilustrováno	15,- Kčs
<u>F. Tuglas: Kvin noveloj.</u> Výbor z povídek estonského klasika	20,- Kčs
<u>En fremda urbo.</u> Sci-fi povídky A. Valtona, vydáno ke 100. výročí esp.	27,- Kčs
<u>E. Urbanová: El subaj fontoj.</u> Básnická sbírka známé české esperantistky, členky Esperantské akademie	16,- Kčs
<u>J. Kořínek.</u> Výbor originálních básní i překladů nedávno zesnulého literáta, zasloužilého pracovníka kultury	5,- Kčs
<u>Kvarfolio.</u> Básně českých esperantských básníků (Karen, Rumler, Urbanová, Viđman)	4,- Kčs
<u>V. Nezval: el mia vivo.</u> Úryvky z díla nár. umělce přeložil J. Vondroušek	4,- Kčs
<u>P. Bezruč: Sileziaj kantoj.</u> Přeložili Pumpr, Kořínek a Hromada	11,- Kčs
<u>Meze de Europono.</u> Přehled dějin Československa od počátků slovanského osídlení	15,- Kčs
<u>Olomouc.</u> Průvodce městskou památkovou rezervací.	9,- Kčs
<u>Ĉiam malnova kaj ĉiam nova.</u> Kniha fejetonů o Praze.	19,- Kčs
<u>Různé propagační materiály:</u>	
odznaky (svazu, sekci, sběratelské kuriozity) cena 5,-, 6,-, 7,-	až 14,- Kčs
tašky igelitové (100 let, klíč)	4,-, 2,50 "
vlažečka (trojúhelník, lze zavěsit)	13,50 "
medaile ke 100. výročí esperanta	130,- Kčs
medaile včetně etue	144,- Kčs
plaketa s portrétem Dr. Zamenhofa k zavěšení	35,- Kčs
gramodeska Barbuloj (4 písně v esperantu)	16,- Kčs
plakát skupiny Barbuloj	7,- Kčs
samolepky různé s esp. tematikou v ceně 5,-, 6,-	až 7,- Kčs
esperantské pohledy (5 druhů)	1,60 "
samolepka -esperanto- s čes. textem - aršík 28 ks	4,- Kčs

**Český esperantský svaz
110 01 PRAHA 1, Jilská 10**

NOVINY

Dohlédací pošta Praha 07

Snížený poštovní poplatek povolen

Ředitelstvím pošt Praha

J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6. 4. 1979